


Esperanto U S

Bi-monthly bulletin published by Esperanto-USA ★ 2007/3-4

Dumonata bulteno eldonata de Esperanto-USA ★ 2007/3-4

En la Numero

- ★ Kio novas en la CO?3
- Estraro:**
- ★ Intervuoj.....4-5
- ★ Resumo de la Protokolo de la Estrar-Kunsido5
- Regione:**
- ★ NOREK.....6
- ★ E-pikniko en Ĉikago6
- LK 2007:**
- ★ KREDU je neblaĵoj!7
- ★ Usonaj esperantistoj ŝanĝis ŝildon8
- NASK:**
- ★ Mia Ideala Tago NASK-a.....9
- ★ NASK-anoj Novhejme10
- IJK:**
- ★ Partopreni la homaran familion10
- UK:**
- ★ Humility in Japan11
- ★ Partoprenante en la Zamenhofa revo... ..12
- ★ Kongreso de Eŭropa E-Unio en Maribor.....14-15
- ★ **Pupteatre:** Dr. Esperanto...16
- ★ AAIE-enketilo.....17
- ★ De la Usona Ĉefdelegito de UEA.....18
- ★ La grandeco de D-ro L. L. Zamenhof.....19-21
- ★ Book Service22
- ★ Recenze23
- ★ Vojaĝe24



KOMPLEZE DE W. HARMON

Honore al Donald

Inter la multaj homoj kiuj riĉigis mian vivon elstaras unu: **Donald R. Harlow**. Min benis lia amikeco kaj kunlaboremo dum almenaŭ tridek jaroj. Mi havis la plezuron labori kun li pri multaj aferoj, inkluzive la centran oficejon de Esperanto-USA.

Ne necesas ripeti tie ĉi lian tutan biografion, kiu estas trovebla aliloke. Mi menciuj nur ke li prizorgis bonege la Centran Oficejon de Esperanto-USA de 1979 ĝis 1983 kaj de februaro 2002 ĝis lia emeritiĝo ĉi-jare je la aĝo de 65. Krom tio, li servis kiel sekretario de Esperanto-USA en 1984-1986, poste kiel prezidanto en 1994-1996, kaj redaktoro de la novaĵbulteno en 1987-1995. Estis mia plezuro trakti multajn aferojn kun Don dum mi estis prezidanto kaj estrarano de Esperanto-USA, kaj mi admiras lian fidelecon, klarpensemon kaj inventemon – kaj certe ankaŭ lian humorsenton.

Ĉefe Don estas konata en Esperantio pro siaj multaj literaturaj kreaĵoj kaj enretigado de multe da Esperantaĵoj. Mem talenta verkisto, Don verkis libron pri siaj spertoj kiel esperantisto, *The Esperanto Book*, kiu estas legebla en la reto. Lia ĉefpaĝo “Esperanto Access” estas inter la plej ofte vizitataj paĝoj pri Esperanto en la reto. Liaj literaturaj paĝoj laŭraporte ricevas 1000-2000 vizitojn ĉiutage. Don dividis la Premion Deguĉi de UEA en 2003, kaj estas Honora Membro de Esperanto-USA. En 2007 Don ricevis Diplomon pri Elstara Agado de UEA kaj tiel fariĝis la unua esperantisto kiu ricevis tiun honoron.

Tiuj kiuj bone konas Don Harlow – kiel mi – scias ke li estas vera modelo de homo kiu dediĉis sian vivon al Esperanto kaj esperantistoj. Daŭru longe, Don!

William R. Harmon

Esperanto-USA
 PO Box 1129, El Cerrito CA 94530
 USA/USONO
 ☎ 510/653-0998; 2510/653-1468
 ✉ elna@esperanto-usa.org

President/Prezidanto: Philip G. Dorcas
 Vice President/Vicprezidanto: Steven D. Brewer
 Secretary/Sekretario: Julie Spickler
 Treasurer/Kasisto: Anna Bennett
 Other Board Members/Aliaj estraranoj:
 Joel Amis, Ĵenja Amis, Trevor Andrews,
 D. Gary Grady, Anjo Harlow, Lusi
 Harmon, Robert L. Read, Tim Westover,
 Christopher Zervic.

Director, Central Office/Direktoro de la
 Centra Oficejo: William Harris

Esperanto USA
 Bi-monthly bulletin published by
 Esperanto-USA
 Dumonata bulteno publikigata de
 Esperanto-USA
 Vol. 46, No. 3-4 2007
 ISSN 1056-0297
 Editors/Redaktoroj:
 Joel Amis kaj Ĵenja Amis
 Layout/kompostado: Ĵenja Amis
 ✉ yevgeniya_amis@yahoo.com

Materials for **Esperanto USA** should be
 sent to/Materialojn por **Esperanto USA**
 oni sendu al:

Esperanto USA (Joel & Ĵenja Amis)
 2025 Peachtree Rd. NE, #927,
 Atlanta, GA 30309, USA/USONO
 or by e-mail/aŭ retpoŝte al:
 joelamis@yahoo.com

The opinions expressed in this bulletin are
 those of the authors, and don't necessarily
 represent the point of view of Esperanto-
 USA or its bulletin/La opinioj esprimitaj
 en tiu ĉi bulteno apartenas al la aŭtoroj,
 kaj ne nepre prezentas la vidpunkton de
 Esperanto-USA aŭ ties bulteno.

Reprinting materials from this bulletin is
 permitted, provided that due credit is
 given, and a copy of the reprinted mate-
 rial is sent to Esperanto-USA/Estas per-
 mesate reaperigi materialojn el tiu ĉi
 bulteno, kondiĉe ke oni ĝuste indiku la
 fonton kaj ke oni sendu ekzempleron de
 la republikigita materialo al Esperanto-
 USA.

Saluton karaj gesamideanoj!

*Bonvenon al la (duobla) kongresa nu-
 mero de Esperanto USA! Se vi, kiel viaj
 redaktoroj, ne povis partopreni iujn el la
 interesaj Esperantaj eventoj okazintaj
 dum la somero, vi havos la okazon gus-
 tumeti plurajn el ili en tiu ĉi numero.
 Aliflanke, tiuj kiuj ja partoprenis unu aŭ
 pli el tiuj ĉi eventoj povos reviziti, retra-
 vivi kaj rememori ilin. Atendas vin rapor-
 toj pri la ELNA-kongreso en Tiĥuano, la
 Universala Kongreso (UK) en Jokohamo, la
 Internacia Junulara Kongreso (IJK) en
 Hanojo, kaj la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) en Sandiego, kompreneble,
 sed ankaŭ artikoloj pri la Nord-Okcidenta Regiona Kongreso (NOREK) en Brita
 Kolumbio kaj la Kongreso de la Eŭropa Esperanto-Unio (KEEU) en Slovenio.*

*Kongresoj ja estas amuzaj, agrablaj eventoj, kaj ankaŭ esenca parto de nia
 Esperanta kulturo. Tamen je la komenco de ĉiu nia Landa Kongreso la Estraro de
 Esperanto-USA dediĉas plenan tagon al diskutado kaj planado de la agado kaj di-
 rekto de nia organizo. En tiu ĉi numero vi trovos resumon de la protokolo de la estr-
 ar-kunsido, kaj ankaŭ intervjuojn kun du el la kvar novaj estraranoj elektitaj dum la
 ĉi-jara kongreso (intervjuoj kun la ceteraj du aperos en la sekva numero).*

*Pro la alproksimiĝo de Zamenhof-tago (15-a de decembro), la ĉefa temo de la
 venonta numero estos la Interna Ideo kaj Zamenhof. Bv. sendi viajn ĉi-temajn ar-
 tikolojn, pensojn, poemojn ktp. al la redakcio ĝis la unua de decembro (sed prefere
 pli frue!). Antaŭdankon al ĉiuj pro la kontribuoj!*

Agrablan legadon!

Joel kaj Ĵenja

Greetings dear samideanoj (fellow Esperantists)!

*Welcome to the (double) convention issue of Esperanto USA! If you, like the edi-
 tors, were unable to participate in any of the summer's interesting Esperanto events,
 you will have the opportunity to get a small taste of several of them in this issue. On
 the other hand, those who did participate in one or more of these events will be able
 to revisit, re-experience and remember them. You will find reports on the ELNA
 Convention in Tijuana, the World Convention (UK) in Yokohama, the International
 Youth Convention (IJK) in Hanoi and the North American Summer Courses (NASK)
 in San Diego, of course, but also articles on the Northwestern Regional Convention
 (NOREK) in British Columbia and the Convention of the European Esperanto Union
 (KEEU) in Slovenia.*

*Conventions are indeed fun, pleasant events, and also an essential part of our
 Esperanto culture. Nevertheless, at the beginning of each of our national conventions
 the Board of Esperanto-USA devotes an entire day to discussing and planning the ac-
 tivity and direction of our organization. In this issue you will find a summary of the
 board meeting minutes, as well as interviews with two of the four new board mem-
 bers elected during this year's convention (interviews with the other two new board
 members will be published in the upcoming issue).*

*As Zamenhof Day (December 15th) is approaching, the main theme of the upcom-
 ing issue will be the "Interna Ideo" and Zamenhof. Please send your articles, thoughts,
 poems, etc. on this subject to the editors by December 1st (or earlier). Thanks in ad-
 vance for your contributions!*

Pleasant reading!

Joel and Zhenya



Kio novas en la Centra Oficejo?

KOMPLEZE DE W, HARRIS



August and September are traditionally quiet times at the Central Office. The *Landa Kongreso* has come and gone, and activities relating to the annual membership campaign for next year will not start until October.

The annual membership campaign usually stresses the benefits of being a member of Esperanto-USA, but there are two benefits which have not received much attention in the past. As a result, E-USA members do not take advantage of them as

much as they should.

The first of these is the privilege of blogging at the E-USA website. Any member of E-USA can blog (write and publish your opinions in a web log), in English or in Esperanto. You may not think of yourself as a blogger, or you may not yet feel comfortable about expressing your opinions in Esperanto, but I encourage you to sign up for an account on the website anyway.

Signing up for an account is fairly easy, and completely automatic. Just think up a username (can be pretty much any string of characters), and go to the website homepage and click on 'Create new account'. Follow the instructions, and your password will be emailed to you. If you run into any problems, send a message to the CO, and we will try to help solve them.

Once you have an account you can log in and add comments to the blogs of other members. This is a great opportunity to practice your written Esperanto. Comments can be as short as 'Mi konsentas.' or as long as or longer than the original blog. You can post your comments in English, but your opinions usually carry more weight if you express them in Esperanto.

Once you have some experience publishing comments about other blog entries, you may be ready to publish your own blog entries. To do this, you will need to send a note to the CO, asking that your user profile be updated to show that you are a cur-

rent member of E-USA. Anyone can request a user account and make comments, but only members can publish their own blog entries. Once your profile is updated, you can blog to your heart's content.

The second benefit, which somewhat parallels the first, is the privilege of being able to write articles for this newsletter, **Esperanto USA**. With very few exceptions, the editor of this newsletter will publish any article that would be of interest to the average reader*. A letter to the editor is usually published, and well-written short stories or poems in Esperanto are also accepted. Your blog entries, or reactions to other blog entries, are often the seeds of a great newsletter article or letter to the editor.

Remember, as a member of Esperanto-USA you are by definition an activist and a potential leader in the U.S. Esperanto movement. Exchange of ideas and opinions in the website and in the newsletter keeps our movement alive and healthy. Start making your contributions today!

Bill Harris,
Director

* As a general rule, articles in English should be related to Esperanto or the language problem, whereas topics of articles written in Esperanto can be of broader interest – Editor.

Pasporta Servo – Donacoj estas Bonvenaj!

Lastatempe usonano donacis \$100 al Pasporta Servo pere de E-USA. Mi ricevis dank-mesaĝon, de Derk Ederveen, kompilanto de Pasporta Servo, kaj mi opinias ke ĝi estus interesa al la legantoj de nia bulteno.

Sinjoro Ederveen skribis:

"Bonvolu transdoni al sinjoro W—niajn sinceregajn dankojn pro la donacego... Ni tutkore dankas lin pro la jaroj dum kiuj li gastigis Esperantoparolantojn, kaj esperas ke li ankaŭ mem agrable uzis la servon.


Pasporta Servo multe baraktas por elturniĝi finance, kaj ĉiu subteno estas tre tre bona. Niaj nuraj enspezoj venas el profito de la vendado de la adresli-

bro, per kio ni devas pagi presadon de 1700 adreslibroj, senpagan sendadon al pli ol 1200 gastigantoj tutmonde, presadon de aligiloj, presadon kaj dissendon de respondiĵoj, korespondadon, telefonadon, administradon ktp. Lastatempe ni eĉ esploras aperigon de anoncoj por malgrandigi la deficiton kaj garantii pluekziston de la servo.

Do, via donaco estas varme kaj danke akceptata, dankegon denove!"

Eble aliaj usonanoj pripensos donacojn al Pasporta Servo.

Bill Harris,
Direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA



La nov-elektitaj estraranoj respondas la demandojn de Esperanto USA



Christopher Zervic

Red: *Saluton – kaj gratulojn pro via elekto! Bv. priskribi viajn planojn kiel estrarano – kion vi volus atingi dum via oficperiodo?*

Kio, laŭ via opinio, estas plibonigenda en Esperanto-USA – kaj kiel vi povas helpi plibonigi tion, kiel estrarano?

CZ: Ĝenerale, mi celas ke E-USA pligrandiĝu kaj plifortiĝu. E-USA devas havi pli bonan kontakton kun la membraro. Necesas eĉ kontakti persone ĉiun membron, por saluti, por danki, por doni konsilojn pri Esperanto, kaj por doni eblecon fari sugestojn pri la progreso de la Ligo. La estraranoj, eĉ mi mem, devas partopreni tian kontaktadon. Mi kredas ke per ĉi tia kontakto membroj sentos sin pli forte ligataj al la Ligo. Ili ĉeestos kunvenojn kaj pagos membrotizojn feliĉe.

Red: *En via biografieto en la balotilo vi skribis i.a. “My vision for the Esperanto League is as an organization that coordinates local-level activity and gives groups the tools to organize and take Esperanto to the public. The challenge is to find novel ways of generating positive publicity while being cost-conscious”. Kiel, laŭ vi, eblas atingi ĉi tiujn celojn?*

CZ: La lokaj grupoj en Usono estas tre gravaj, ĉar ili donas al publiko pretan eblecon renkonti la lingvon Esperanto. En iuj urboj troviĝas homoj entuziasmaj pri Esperanto, kaj tre volemaj helpi propagandi ĝin, sed sen scipovo fari ĉi tion. E-USA devas prepari homojn por organizi klubagadon kaj instrui Esperanton.

Mi memoras la propagandadon faritan de Kent Jones. Kent havis je sia dispono multajn flugfoliojn por diversaj celoj: ekzemple vortolistoj, gramatikskizoj, korelativtabeloj, kaj anglalingvaj artikoloj pri la granda utilo de Esperanto. Kent invitis interesitojn por lerni telefone aŭ en lia domo. Kiel emeritulo, Kent havis multan tempon

por prepari ĉion ĉi. E-USA metu similajn rimedojn je la dispono de lokaj kluboj por ke ili povu kompetente prezenti la lingvon kaj la Movadon al interesitoj, sen elspezi multan monon aŭ eĉ tempon.

Dua afero estas allogi interesitojn. Elspezi monon por reklamado ne estas saĝe. Ni trovu pli malaltkostajn rimedojn por informi pri Esperanto, kiel gazetaraj anoncoj kaj anoncoj de kunvenoj en ĵurnaloj. Kluboj estu videblaj en la komunumoj, ekzemple, per donado de homfortoj al la bonfaraj (nepre ne politikaj!) agadoj de aliaj grupoj.

E-USA kompreneble notu kio bone sukcesas kaj kio fiaske paneas.

Tim Westover

Red: *Saluton – kaj gratulojn pro via elekto! Bv. priskribi viajn planojn kiel estrarano – kion vi volus atingi dum via oficperiodo?*

Kio, laŭ via opinio, estas plibonigenda en Esperanto-USA – kaj kiel vi povas helpi plibonigi tion, kiel estrarano?

TW: Esperanto-USA devas zorgi pri komunikado al siaj membroj. La malregula aperritmo de la bulteno devas esti ĝustigita, kaj la estraro devas komuniki kun la membroj kiam estas anoncindaj aferoj — aŭ nur por kuraĝigi kaj informi. Estas iom ŝoke ke ĝis nun (12-a de septembro) ne aperis letero pri la nomŝanĝo — tiajn aferojn oni nepre komuniku al la membroj per speciala dissendo. Tiun komunikadon ni faru ne nur per la retejo kaj dissendolistoj, sed ankaŭ per e-poŝtoj kaj leteroj. Dum la jaroj, Esperanto-USA kreis datumbazon kiu multe pli superas nian nunan membraron, kaj tiu datumbazo kreskas tage pro novaj informpetintoj. Al tiuj ni povas pli efike reklami, ol al la ĝenerala publiko.

Ni nun provas pligrandigi nian videblecon en ĵurnaloj kaj magazinoj per pagitaj reklamoj, sed ni ne neglektu niajn jamajn kontaktojn.



HOSS FIROOZANIA

Mankas novaj afiŝoj en la blogoj ĉe nia retejo. Ni provu kuraĝigi regulan afiŝadon tie, ĉu per konkursoj, ĉu per tem-semajnoj, ĉu alimaniere.

Niaj flugfolioj kaj disdonaĵoj enhavas tre bonan informon, sed ofte aspektas amatoraj, kaj la informo ne ĉiam traktas la novajn eblecojn de la reto — blogoj, Lernu, podkasto, ktp. Ni povas elspezi el nia reklama buĝeto por krei pliprofesiapektajn kaj ĝisdatigitajn eldonaĵojn. La “bierafiŝo” povus esti montrata en ajna taverno, dormejo, aŭ kiĉa restoracio, se ĝi estus pli okulfrapa.

Plej reve, plaĉus al mi vidi ke Esperantaj kluboj kaj organizaĵoj farus ion krom paroli Esperanton ĉirkaŭ tablo — ili faru ion per Esperanto, ĉu korespondi kun alia Esperanto-klubo, ĉu organizi lingvan festivalon, ĉu subteni poemkonkursojn, ĉu volontuli en manĝejo por senhejmuloj. Ĉio ĉi pligrandigus la videblecon de Esperanto kaj montrus ke Esperanto ne estas nur brakseĝa lingvo, sed vivanta lingvo por aktiva popolo.

Red: *Dum vi estis en la eldona komitato de ELNA, nia organizo eldonis la libron kiu fariĝis unu el la plej bone vendataj libroj de ELNA kaj UEA. Ĉu estas planataj aliaj “grandaj” eldonaj projektoj en nia organizo – kaj, se jes, kiuj?*

TW: Ĝis nun, ne estas konkrete plano por nova libro, kvankam ekzistas nebulaj ideoj kaj longdistancaj celoj. Nia buĝeto estas ne senlima, kaj niaj bretaroj en la oficejo estas malgrandaj. Tial, ni devas zorge elekti aperigotajn verkojn kaj eĉ rifuzi aperigindajn. La eldona komitato konscias ke nia ĉefa celo estas instrua, kaj nia ĉefa merkato estas anglalingva — lernolibroj kaj vortaroj. La eldona komitato ne celas publikigi beletrajn aŭ fakajn verkojn — unue pro tio ke tiaj verkoj ne vaste vendiĝas en Esperanto, kaj due pro tio ke ekzistas aliaj eblecoj publikigi tiajn verkojn malgrandskale, eĉ per interretaj presejoj. Aŭtoroj de tiaj verkoj estas ege valoraj al la Movado (mi mem havas literaturajn pretendojn en nia lingvo), sed en la moderna epoko aŭtoro ne devas dependi de la kapricoj de (konfesinde) konservativaj eldonejoj, kiel Esperanto-USA.

PMEG havas pli grandan celmerkaton ol multaj el la verkoj publikigitaj en

ELNA/Esperanto-USA. Ni simple vidis bonan eblecon, reagis rapide, kaj povis aperigi valoran libron. La politiko de la eldona komitato ne estas tiel rigora ke ĝi malpermesas al ni profiti feliĉan hazardon.

Red: Antaŭ iom da tempo vi sukcesis akiri por Esperanto-USA senpagan reklamadon per la programo "Google Grants". Kiuj estas (por nuna momento) la rezultoj de tiu ĉi programo? Kaj kiuj estas viaj planoj pri videbligo de Esperanto-USA al la publiko en Usono?

TW: Dank' al la kunlaboro de Robert Read, Steve Brewer, kaj aliaj membroj en la Informada Komitato, la rezultoj estas tre

bonaj. Pli ol duono de la taga trafiko al nia retejo venas per AdWords. Informpetoj al la CO ses- aŭ sepobliĝis. Por diri konkretajn nombrojn: ekde la komenco de la kampanjo en marto 2005, venis 72,078 vizitantoj al esperanto-usa.org per Google AdWords. Ni konstante lernas pli vaste kaj efike uzi la AdWords-sistemon, kaj la nombro de tagaj vizitantoj kreskas ĉiutage. Nun, ni bonvenigas ĉirkaŭ 300 vizitantojn tage per AdWords, kompare al 20 – 30 tage antaŭ jaro. 64,720 el la 72,078 vizitoj per AdWords estis en la lastaj ses monatoj.

AdWords helpas al ni reklami Esperanton al serĉantoj kiuj eble ne scias,

ke Esperanto estas bona respondo al iliaj bezonoj. Ekzemple, ni reklamas Pasportan Servon al tiuj kiuj serĉas pri junularaj gastejoj. Ni reklamas al hejmlernantoj kiuj serĉas instrumaterialojn. Ni reklamas al tiuj kiuj interesiĝas pri planlingvoj (sciencfikciaj, fantaziaj, aŭ filozofiaj). Kaj ni provas kapti tiujn kiuj simple serĉas "Esperanto"n — se tiuj venas al nia retejo, ili povas peti freŝan informon rekte de ni, trovi lokan Esperanto-klubon, kaj mendi librojn kiuj ne nur helpas al la serĉanto, sed helpas al Esperanto-USA.

La unua ago de la Estraro estis fari proponon por la membraro de ELNA, ke Lucille Harmon estu Honora Membro. Dum la plena aferkunsido de la membraro, la membroj unuanime kaj per akلامo aprobis la proponon.

La Estraro faris kaj aprobis rezoluciojn por danki al Mar Cardenas kaj la LKK de la Landa Kongreso pro ilia granda laboro; por danki la Kandidatigan Komitaton pro la bonega aro de kandidatoj sur la balotilo; kaj la stabon de la Hotelo Pueblo Amigo en Tihuano, la Santee Inn, kaj Jimmy's Restaurant pro la bona servo kaj etoso kiun ili donis al la Estraro kaj la membroj de ELNA.

Sekvis diskuto pri la Centra Oficejo, kun detaloj de la veno kaj laboro de William Harris kiel nova Direktoro. La plej grava afero pri la Centra Oficejo estas la bezono trovi novan lokon por ĝi, pro tio ke la nuntempa konstruaĵo estos detruata iam dum la somero de 2008. Dum la Aferkunsido de ELNA, la Prezidanto anoncis la bezonon, kaj petis la helpon de la membraro por trovi taŭgan spacon en komunumo kie la Esperanto-grupo estas sufiĉe forta kaj aktiva por subteni la CO-n. Estis sugestita de Aleksandro Shlafer ke la organizo aĉetu konstruaĵon por la CO, se eblas.

La posta diskuto temis pri la retbutiko. Laŭ Stephen Brewer, li kaj Tim Westover laboras trovi rimedon por solvi kelkajn problemojn, kaj la retbutiko ankoraŭ ne estas uzbla.

Estis diskuto pri nova redaktoro por la bulteno, **Esperanto USA**. Por nun, la nunaj redaktoroj restos, kaj la ŝanĝoj pri la bulteno estas ĉefe ke pli da informo pri landaj aferoj kaj la agoj de la organizo estos grava parto de la bulteno, kiu aperos regule, laŭ



Resumo de la Protokolo de Estrar-Kunsido dum ELNA-kongreso 2007

fiksita ritmo, dum la jaro. Oni emfazas, ke la bulteno estas la ĉefa informilo inter la organizo kaj la membraro, kiu dependas je ĝi por novaĵo pri la organizo.

Sekvis prezentado pri la buĝeto de Anna Bennett, kiu menciis la grandan helpon kiun ŝi ricevis de Vilĉjo Harris pri la buĝet-sistemo. Ŝi faris konservativan dujaran buĝeton kiu antaŭvidas neoptimisman enspezon. La buĝeto estas ekvilibra, kaj enhavas bonan distribuon de mono por gravaj bezonoj. La Estraro aprobis la buĝeton unuanime.

Estis diskuto pri la ideo ke iu kiu volas membriĝi post duono de la kalendara jaro havu rabaton je la kosto de membreco. La Estraro akceptis la sugeston de Vilĉjo Harris ke nova membro ricevu rabaton (eble kiel kuponon, aŭ krediton en sia konto) de duono de la membro-kotizo, uzeblan en la sekvanta jaro kontraŭ la kosto de membreco en tiu jaro. La Estraro aprobis la proponon.

La Estraro iom diskutis la venontan LK-

on, kiu okazos samtempe kun la Tut-Amerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en Montrealo. Kelkaj detaloj restas pri la divido de tempo, spaco, kaj kostoj inter ELNA, la Kanada Esperanto-Asocio, kaj TAKE. Ankaŭ la Estraro komencis diskuti la lokon por la Landa Kongreso en 2009, sed ne faris decidon.

Estis diskuto pri ŝanĝo de la datoj de raportoj kaj de la fiska jaro de la organizo por kongrui kun la kalendara jaro. La ŝanĝo estis aprobata.

Sekvis diskuto pri la reklamoj kiujn ELNA metis en kelkajn gazetojn: ĉu ili rezultas en novaj inform-petantoj? La decido estis daŭrigi la reklam-programon, ĉar ne estas facile (aŭ eĉ eble) koni la veran fonton de novaj membroj. La programo uzas kodon por scii el kiu gazeto venas la informpeto; ni daŭrigos la reklam-programon.

“La sola problemo pri la kongreso... ĝi estis tro mallonga”

Rikardo Anderson-Connolly

NOREK estis mia unua Esperanto-kongreso. Ĝi okazis la 21-23-an de septembro en Sidney, Brita Kolumbio, Kanado, sur la bela insulo Vankuvero apud Viktorio. La kongres-hotelo situis ĉe la marbordo kaj estis bela kaj komforta. Ofte dum septembro en la nordokcidento (aŭ sudokcidento, Kanade) la vetero al oni malplaĉas, sed por ni la suno brilis kaj la temperaturo agrablis.

Tamen la plej bona aspekto de

NOREK estis, kompreneble, la homoj. Mi konatiĝis kun multaj samlingvanoj kaj trovis veran etoson de amikeco inter ili.

Pro tio ke mi estas komencanto la interparolado kaj prelegoj tre superis mian lingvokapablon. Plejparte mi lernis Esperanton aŭtodidakte – per libroj kaj komputilo – do mi ne havis multan sperton pri interparolado. Nun mi pli bone parolas post tiu unusola semajnfino de mergiĝo. Mi rekomendas al aliaj memlernantoj ke ili ĉeestu kongreson aŭ lokan Esperanto-grupon.

La kongreso prezentis multajn agrablajn erojn. La prelegoj interesis min, aparte tiu de Anna Bennett pri paca parolado. Mi ĝuis ankaŭ la filmon en Esperanto pri polusaj ursoj. Mi partoprenis en Esperanto-ateliero de Brian Kaneen, kaj mi dankas lin pro la bonaj lernolibroj kaj vortaro. Fine, la ĉina restoracio plaĉis a ĉiuj. La manĝaĵo tre bongustis kaj la konversacio viglis.

La sola problemo pri la kongreso... ĝi estis tro mallonga. Do mi tre antaŭĝuas la Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto en Montrealo en julio.



Wally du Temple

KOMPLEZE DE W. HARRIS



Ralph Gonyea blovanta per korneto

Viktor Pajuk (“Araneo”)

En la fino de la 20-a jarcento inter ĉikagaj gesamideanoj estis popularaj E-piknikoj kiujn “motoris” senlaca Kent Jones. Bedaŭrinde, post lia forpaso en 2004 la aranĝoj ne okazis ĝis ĉisomere: internacia E-familio, Roberto kaj Sepideh, aĉetinte novan domon, kore invitis esperantistojn al renovigo de la E-pikniko, kaj ĝin partoprenis pli ol 20 ripozantoj el Ilinojso kaj Viskonsono. Krom “verdlingvanoj” ĉeestis ankaŭ kelkaj “krokodiloj” – familianoj kaj najbaroj kiuj eksentis la vivecon de la Internacia Lingvo. Lingvan ordon subtenis ankaŭ “verda policano” (aŭtoro de tiu ĉi artikoleto) kiu malpermesis uzi aliajn lingvojn inter gesamideanoj.



KOMPLEZE DE V. PAJUK

Kredu ke neeblaĵoj eblas, kredu je nekredblaĵoj!

Bonvenigo de la organizanto, Martha Cárdenas-Loutzenhaiser, al la LK 2007



KOMPLEZE DE M. KARDENAS

Martha Cárdenas-Loutzenhaiser (Mar Kardenas), <Mar@GrupoAmikema.org>

Mi scias ke eble vi plejparte ankoraŭ ne konas min. Do, mi estas Mar Cárdenas kaj mi kaj aliaj bonkoruloj kunlaboris por la okazigo de ĉi tiu kongreso.

Mi ŝatus publike danki al Lusi Harmon kaj al Henry Studer pro ilia laborego por ĉi tiu kongreso, kaj al sandieĝanoj pro la apogo kiun ili ĉiam donas al mi. Ilia amikeco multe gravas al mi. Koran dankon al Sinjorino Alberta Casey pro la kasedoj, kiujn vi trovis en viaj saketoj.

Ĉi-jare la kongresa komitato estis tre internacia. Mi havis helpantojn el multaj landoj, ekzemple, Renato Corsetti, el

Italio. Martin Schäffer, el Germanio. Eduardo Navas el Salvadoro, Alan Mendelawitz el Aŭstralio, Roberto Sartoro el Argentino, Genildo Martins Coelho el Brazilo, kaj multaj pliaj! Ĉi tiu evento estas bonega pruvo ke internacia kunlaboro eblas!

Ne estas sekreto ke ELNA decidis havi sian kongreson en Tihuano post mia invito dum la kongreso en Novjorko. Mi parolis kun Lusi Harmon pri la ideo kaj miaj planoj, kaj demandis al ŝi, “Ĉu miaj planoj estas neeblaĵoj?” Ŝi proponis la ideon al la estraro kaj mi preparis min por la reago. Mi pensis ke eble mia sunbrila espero malsukcesus. Tamen mia kara patro ĉiam instruis al mi ke mi devas ĉiam kredi je neeblaĵoj.

Mi memoras la komentojn faritajn post ŝia propono. Ĉiuj konsentis! (Se mi bone memoras...) kaj hodiaŭ mi estas ĉi tie, kun vi, farante ĉi tiun prelegon antaŭ la komenco de nia kuna tempo.

Mi forte kredas ke dum la semajnfino ni kreos novan manieron por rilati unu kun la alia. Mi scias ke tio kelkfoje ŝajnas neebla, se vi aŭskultas la novaĵojn en televido. Tamen, ni kredu je neeblaĵoj! Ni kredu ke nia dunacia teamo povas krei, per kunlaboro, fidon je la ebleco de sukceso.

La plejparto el vi estas esperantistoj dum longa tempo, ĉu ne? Estas ankaŭ multe da genovuloj, kiel mi, kiuj malkovris Esperanton antaŭnelonge. Nia

teamo estas tre diversa, sed ni devas kaj povas kunlabori same kiel la organoj de niaj korpoj kunlaboras — ĉiu organo plenumas sian propran, vivdonan celon.

Nia fina celo estas atingebla. Ni nur devas kredi ke ni povas atingi ĝin. Memoru ke nenio estas neebla kaj ke io bona rezultos. Kredu je neeblaĵoj, ĝuste kiel mi faris antaŭ unu jaro. Tio estas la sola maniero por atingi niajn celojn.

Mi nun finos mian malgrandan prelegon per unu el miaj plej ŝatataj citaĵoj. Ĝi estas prenita el libro verkita de brila matematikisto kiu aŭdacis kredi je nekredblaĵoj. Certe vi legis ĝin dum via infanaĝo, tamen mi volus ke vi rememoru ĝin, taksu ĝin, kaj parkerigu ĝin.

“Ne utilas provi” diris Alico, “oni ne povas kredi je neeblaj aferoj!”

“Mi supozas ke vi ne havis multe da praktiko” respondis la Reĝino, “Kiam mi havis vian aĝon, mi ĉiam faris tion dum duonhora ĉiutage. Fakte, kelkfoje, mi kredis je pli ol ses neeblaj aferoj antaŭ la matenmanĝo!”

Do, la estonteco de la Esperanta Movado en Ameriko dependas de vi ĉiuj kaj de tio kion vi elektas kredi!

Ĉiu el ni elektas siajn proprajn kredojn!

Mar Cárdenas malkovris Esperanton en januaro 2005.

Fonto: <http://esperantofre.com>



S. BREWER (HTTP://FLICKR.COM/PHOTOS/LIMAKO)



KOMPLEZE DE ENRIQUE ELLEN

Usonaj esperantistoj ŝanĝis ŝildon



Steven Brewer

La landa kongreso de la usona landa asocio de UEA ĉi-jare okazis ne en Usono, sed en Meksiko, en la urbo Tihvano, proksima al la usona landlimo. En la kongreso Esperanto-Ligo por Norda Ameriko oficiale ŝanĝis sian nomon al Esperanto-USA, laŭ propono prezentita antaŭ pli ol tri jaroj, kaj unu-uafoje oficiale diskutita jam en la landa kongreso en la jaro 2005. La kongreson partoprenis ankaŭ aktivuloj de la meksika movado, kaj oni komune decidis, ke la Universala Kongreso estu invitita al Meksiko, kiam la loka movado sufiĉe fortos. Pasintjare UEA havis nur 22 individuajn membrojn en Meksiko.

Proksimume cent esperantistoj vojaĝis al Tihvano, Meksiko, por la usona landa kongreso, okazinta fine de julio. La hotelo Pueblo Amigo gastigis la kongreson lukse kaj afable nur unu kilometron de la landlimo kun Usono. Mar Cárdenas kaj la Loka Kongresa Komitato multon faris por organizi belan kongreson, kaj la fakto ke ĝi okazis ekster Usono (eĉ se nur je duonmejlo) donis al la kongreso rave fremdetan etoson.

Multaj kongresanoj vojaĝis kune per aŭtobuso rekte de la estrarkunsido kiu okazis en Santee, urbo ekster San Diego en Kalifornio.

La kongresejo estis luksa kaj bone traktis la gastojn. Estis grandega, sesetaĝa ĉambro en la mezo, kie okazis kelkaj programeroj. Samloke estis ankaŭ la restoracio kaj kazino.

La nura plendo pri la kongresejo estis ke en tiu ĉambrego la bruo de la maŝinoj de la kazino foje malfaciligis la aŭdadojn, speciale por la maljunuloj. Foje fariĝis kome-

dio, en kiu unu homo diris “Parolu pli laŭte – Mi ne povas aŭdi vin!” kaj alia respondis, “Kion vi diras? Mi ne povas aŭdi vin!”. En la aliaj salonoj tio ne estis problemo.

La malferman prelegon faris Duncan Charters, profesoro de Principia Kolegio en Ilinojso. Unu el la plej bonaj oratoroj el Usono, li pritraktis la kongresajn temojn de lingvoj, landlimoj, kaj justeco en lingvaj rilatoj. Aliaj prelegoj traktis diversajn temojn, inter ili la usonan kaj meksikan Esperanto-movadojn.

La movado en Meksiko lastatempe havis organizajn problemojn inter la ĉefroluloj, kio rezultis en tio ke la landa asocio de UEA en Meksiko dum iom da tempo eĉ riskis sian oficialan statuson ĉe UEA, pro tro malmultaj membroj.

En diversaj prelegoj, organizantoj de la regiona movado prezentis planon por solvi la diversajn problemojn kaj antaŭenigi Esperanton en la regiono. Vere montriĝis kuraĝiga bildo de la progreso de la Esperanto-movado en Meksiko.

La decidojn de la estraro kaj rezultojn de la balotado oni anoncis ĉe la solena fermo. Al

Lusi Harmon oni donis honoran membrecon pro ŝia dumviva aktivado por Esperanto.

Finfine estis farita decido pri la nomŝanĝo: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko nun estu nomata “Esperanto-USA”. Tiu decido sekvis de multjara diskuto pri tio ke la nomo malĝuste ŝajnigis ke la organizaĵo celas ne nur Usonon, sed ankaŭ la aliajn nordamerikajn landojn – Kanadon kaj Meksikon.

En la balotado, Julie Spickler estis elektita sekretario. Krome estis elektitaj kvar estraranoj, inter ili Tim Westover, kiu ĵus gajnis la unuan premion por proza verkado en la Belartaj Konkursoj de UEA.

Okazis belaj ekskursoj dum la kongreso – al la urbo-centro, la kultura centro, kaj al la punkto en kiu la landlimo inter Usono kaj Meksiko atingas la maron. Por mi, kiel usonano, estis interese pripensi kiel aspektas Usono de ekstere. Postkongresa ekskurso iris al la marbordaj urboj Playas de Tihvano, Rosarito, kaj Ensenada.

Unu el la plej gravaj celoj de la kongreso estis montri solidarecon inter usonaj kaj meksikaj samideanoj. La plejmulto de la partoprenantoj estis usonanoj, sed venis ankaŭ aro el la plej aktivaj esperantistoj en Meksiko. Kunsido pri la Amerika Komisiono de UEA kunigis aktivulojn el Usono kaj Meksiko por diskuti, kiel plej bone kunlabori por antaŭenigi Esperanto-agadon inter la du landoj.

La plej grava rezulto estis inviti la Universalan Kongreson al Meksiko, kiam la landa asocio sufiĉe fortos por fari la inviton. La prezidanto kaj vicprezidanto de Esperanto-USA donis sian subtenon al tiu plano.

Fonto: *Libera Folio*



KOMPLEZE DE ENRIQUE ELLEMBERG

Mia Ideala Tago NASK-a

Koto Farmer

Kial mi tre, tre ĝuis mian NASK-an sperton? Ĉar mi vere povis nur studi.

Hejme, mi devas vekigi kaj kuiri. Ĉe NASK, mi povis vekigi kaj piediri al la kafejo *Ventana*, kie mi bone matenmanĝis, parolante kun miaj novaj geamikoj.

Hejme, mi devas kaj purigi la apartamenton, kaj lavi vestaĵojn, kaj labori en nia ĝardeno, kaj fari diversajn irtaskojn por mia familio kaj miaj amikoj.

Ĉe NASK, mi povis iri (piediri aŭ iri per buso) al la klasĉambro kaj aŭdi, paroli, legi, skribi kaj kanti Esperante kun la aliaj klasanoj kaj nia atklara instruisto, Liĉjo Miller. Kia plezura mateno!

Hejme, mi povas naĝi en la apartamenta naĝejo, kiu estas tro malvarma. Poste, mi povas studi dum pli-malpli duonhoron antaŭ la rekomenco de la postuloj de mia familio kaj amikaro.

Ĉe NASK, mi povis eliri el la naĝejo, manĝi frukton, eniri la lingvo-laboratorion

kaj legi librojn Esperantajn, kiujn mi ne havas hejme. Kia ĝuinda posttagmezo!

Hejme, mi devas aĉeti multe da aĵoj, kuiri la vespermanĝon, purigi la kuirilojn kaj manĝilojn kaj paroli pri fakturoj kun mia edzo.

Ĉe NASK, mi devis aĉeti nur paperon, kraĵojn kaj mian preferatan botelakvon en la universitata librovendejo. Mi povis piediri al la kafejo *Ventana* denove kaj vespermanĝi kun la samideanoj. Poste, ni kune povis ĉeesti interesajn programojn, aŭ babili, aŭ spekti "Esperanto – Pasporto al la Tuta Mondo" kune per mia komputila



Lee kaj Koto

DVD-ludilo.

Hejme, mi kutime legas Esperantajn librojn antaŭ endormiĝi. Tion mi faris ankaŭ ĉe NASK!

Vi, karaj legantoj, povas kompreni min: mi tre, tre ĝuis mian studadon ĉe NASK! Mi esperas ke mi studos kune kun vi ĉiuj ĉe NASK 2008!

My Ideal Day at NASK

Koto Farmer

Why did I enjoy my experience at NASK so much? Because I could really just study.

At home, I have to wake up and cook. At NASK, I could wake up and walk to the Cafe Ventana, where I breakfasted well while talking to my new friends.

At home, I have to clean the apartment, wash clothes, work in the garden, and run various errands for my family and my friends.

At NASK, I could go to class (either walking or by shuttle bus) and hear, speak, read, write, and sing in Esperanto with the other students and our expert instructor, Lee Miller. What a pleasant morning!

At home, I can swim in the apartment complex pool, which is too cold. After that, I can study for about half an hour before the demands of my family and friends start up again.

At NASK, I could leave the pool, eat some fruit, go to the language laboratory, and read Esperanto books that I

don't have at home. What an enjoyable afternoon!

At home, I have to buy many things, cook dinner, wash the cooking pots and dishes, and talk about bills with my husband.

At NASK, I only had to buy paper, pencils, and my favorite bottled water at the university bookstore. I could walk to the Cafe Ventano again, and eat dinner with the Esperantists. Afterward, we could attend interesting programs, chat, or watch "Esperanto-Passport To The Whole World" together on my computer's DVD player.

At home, I usually read Esperanto books before falling asleep. I did that at NASK, too!

You, dear readers, can understand me: I really, really enjoyed my studying at NASK! I hope that I will study together with you all at NASK 2008!

Broŝuro pri fama loko nun havebla en Esperanto

En 2006 d-ro Ralph Lewin preparis tradukon de la broŝuro pri la fama preĝejo Holy Trinity Church, Stratford-upon-Avon, Britio, kie estis enterigita Shakespeare. Li raportas ke oni nun disdonas ekzemplerojn de lia traduko al tiuj kiuj petas la informon en Esperanto.

Informis W. R. Harmon

Esperanto

A. La sankta ŝtupilo de la 15-a jarcenta verŝiba pordo estas 13a jarcenta sankteja ringo. Ĉiu fojarto ĝin atingis ĝin rajta protektado dum 37 tagoj.

B. La altara tombo apud la norda muro portas figuraĵojn de William Clopton (1597) kaj de sia edzino Anne. Apud la orienta muro loĝas la tomboj de Joyce Clopton, grafino de Totnes (mort. 1635) kaj de sia edzo George Caere, grafo de Totnes, kaj antaŭ tiu de la barono Clopton (mort. 1629). La loko Totnes estas armlisto de la reĝo James I de Anglio.

C. La ŝerejo estas antaŭ la sakristia ĉefejo de Sankta Andrew.

“Ĉiu rajtas partopreni la lingvon kaj kulturon, pro tio ke ĉiu homo estas ano de la homara familio”

HTTP://PICASAWEB.GOOGLE.COM/TUNGGP/



Sky (“Ĉielo”) Roversi-Deal

La 63-a IJK okazinta en Hanojo, Vjetnamio, estis mia unua kongreso. Ne nur mia unua IJK, sed la unua fojo kiam mi estis kun aliaj esperantistoj! Kia ĝoja afero!

Ĝus kiam mi eniris la kongresejon (kiu estis iom malfacile trovebla, sed tio estas alia rakonto) kaj tuj aŭdis, la unuan fojon, la ĉirkaŭulojn paroli la Internacian Lingvon, mi apenaŭ povis kredi ke tio vere okazas! Post nur sekundoj mi estis parolanta kun aliaj esperantistoj kaj trovis tion tre stranga sperto, ĉar mi bone konis la Internacian Lingvon (mi ekler-

nis ĝin antaŭ du jaroj kaj duono) kaj estis skribinta multe Esperante, sed mi neniam parolis ĝin. Sed mi tre ĝuis tion, kaj post nelonga tempo mia parolkapablo multe pliboniĝis.

Mi antaŭe ne sciis kia estos la IJK. Mi iom timis ke eble pro tio ke mi konas nenion en la Kongreso, mi estus ekster la grupo, ke mi sentus min ne inkluzivata de la aliaj. Sed kiam mi alvenis al la Kongreso, mi tuj trovis ke tio estis tute senbaza timo, ĉar preskaŭ ĉiuj homoj (de ĉiuj aĝoj, ne nur gejunuloj) kiujn mi renkontis ŝajnis amikaj kaj helpemaj al lernantoj, kaj la lingvonivelo aŭ Esperanta parol-kapablo tute ne gravis al

HTTP://PICASAWEB.GOOGLE.COM/TUNGGP/



ili. Mi sentas min fiera ke mi povas nomi ilin miaj samideanoj.

Nu, kompreneble, tio estas la plej grava punkto pri Esperanto: ĝi apartenas al neniu (aŭ pli ĝuste, al ĉiu). Tial ĉiu rajtas partopreni la lingvon kaj kulturon, pro tio ke ĉiu homo estas ano de la homara familio.

Do, mi tre ĝuis miajn spertojn dum la 63-a IJK (krom la veteron, kiu estis tro varma por mi – eĉ malgraŭ tio ke mi loĝas en Havajo!). La LKK kaj la multaj helpantoj estis tre bonvenigemaj, amikaj, helpemaj. Dankon, ĉiuj! Kaj mi certe volas kaj planas iri al la venonta IJK!

NASK-anoj Novhejme

Keneĉjo Goldbergo

En nia ĉambraro, volas mi diveni, loĝis 40, 50, 60, 70 kelkjaraj amantoj de lingvo nia. Sidante ronde ĉe tablo, ni kvar kutime vespere, nokte nin ĝuis.

Tiu ĉi loĝejo esperantuja estis nia parto de la tria, kaj nuna, hejmo de Nord-Amerika Somera Kursaro – NASK – ene de la ampleksa, grandioza tereno de la Universitato de Kalifornio ĉe Sandiego, “UCSD”, kies beleco eĉ pliiĝas kiam oni vidas la proksiman, mirindan, kelkloke na-

turistan, plaĝon *Black's Beach*.

Ni 28 venis Esperantujen de Anglujo, Germanujo, Japanujo, Kanado, Makedonio kaj naŭ ŝtatoj usonaj.

Renaskiĝis, translokiĝis NASK ĝuste dum la 120-jariĝo de la lingvo zamenhofa. Kaj la sekvan monaton... la 80-jariĝo de la komence menciita ĉambraro nia:

Rudigero amata

Sentas mi viajn sunradiojn de la mateno.

Saluton klare mi aŭdas.

Nia somera PIV restos tia.

Redaktis mi...

Redaktis ni kun ĝojo aĝojn Esperantajn.

Kia homo vi estas,

Kia homo vi estas al mi.

Vi nutris min per diskutado lingvistika.

Do festiĝis ĉiu tago.

Pensanto, vivanto simple eleganta,

Ofte pensos mi de vi.

Nur unu peton,

Vangojn ambaŭ de amata de mi Christine kisu.

Al mi, vin premas mi tutkore, tutkore.

Humility in Japan



Crystal Hoshiko Loutzenhiser Cárdenas*

This nation (Japan), as a whole, certainly has this concept down. Much different from the “to each their own” philosophy held by the general population of the United States and a bit of a cultural shock, to be completely truthful.

Today (being a few days ago when I had first arrived in Ranzan), I went exploring this little town near Tokyo as my Mom embarked on a Japan 101 course being taught in Esperanto, and out of range of my understanding. So instead, I went to get pleasantly lost behind my camera lens among the greenery, bamboo, kio ponds and mossy trails.

Upon taking a more industrial path, I came across this candy shop with an extremely benevolent woman busying herself behind the counter. I timidly made my way around the plethora of foods I have never seen before, wrapped up in packaging I could only dream to one day be able to decipher. It did not take long for her to realize one thing about me as she tried desperately to explain that the beautiful paper wall hanging with purple flowers I was interested in purchasing was in fact a store decoration... oops (and let me add, this country's ability to metamorphose paper the way they

do will never cease to amaze me).

Then in another fugal attempt to communicate with me, rattling off some combination of words and gestures, she presented me with a token of humility and kindness in the form of three book marks with origami geishas on them. I am sure there is much more to this hidden in her explanation which is forever lost in translation. Gratefully, I accepted the gifts as I continued my search for some sweets.

She shared the many laughs as another woman came into the store. With a rapid trill of syllables mixed with many twitters and giggles, I could only guess that the other woman was being brought up to speed. Soon both women continued to make their efforts clear that they wished wholeheartedly to be able to converse with me. The twittering continued... but with a smiling face, the store owner gestured for me to take a seat. Perhaps to wait for her to finish the woman's order I thought. But soon the other woman took a seat next to me, and before I knew it I was being served some green tea. (First the bookmarks and then tea... I couldn't decline if I wanted to...)

I clutched my Japanese phrase book/2000 word dictionary. How silly I must have been perceived, desperately flipping through my only bridge between our languages, our cultures, our worlds. How do I say “Nice to meet you”? How do I say “I am from the US”? How do I say “No more tea, please”? as she poured me a third glass.

Gomen nasai, wakarimasen. Nihongo ga hanasemasen. Sorry, I don't understand, I don't speak Japanese. *Domo arigato goza-*

imasu. Thank you so much... as I retreated behind my book again to take another stab at maintaining some sort of coherent conversation.

Unfortunately, the phrase book didn't have translations for any responses to common questions they posed, so it turned into a one way conversation, but in good standing at the very least.

Still the women continued their beautiful nature as I saw the second woman going to the counter, make a quick exchange with the owner, then pushing a jello cup with fruit to me (which has got to be one of the best things I've ever tasted). “Arigato!”... I got that word down pat. Without the words to decline, or to even be sure that it was a gift, I accepted the third gesture of hospitality... truly priceless. Amazing... simply amazing... as I finally found my next chosen phrases in that silly book of mine... *Sayonara.*

As I left I couldn't help but think that the word “Arigato” just does not do justice to the true measure of gratitude I would have wished to express.

* Crystal Hoshiko Loutzenhiser Cárdenas estas filino de Mar Cárdenas

Noto de fiero panjo:

Antaŭ ol ni foriris de Ranzan, mia filino kaj mi vizitis tiun vendejon. Mi volis konatiĝi kun la “dolĉaj-virino”. Mi volis danki ŝin, per mia baza japanlingva nivelo, pro ŝia afableco.

Fonto: www.esperanto-usa.org



[HTTP://PICASAWEB.GOOGLE.COM/PROCIONO/RANZAN2007](http://PICASAWEB.GOOGLE.COM/PROCIONO/RANZAN2007)



[HTTP://PICASAWEB.GOOGLE.COM/PROCIONO/RANZAN2007](http://PICASAWEB.GOOGLE.COM/PROCIONO/RANZAN2007)

Partoprenante en la Zamenhofa revo...



KOMPLEZE DE R. STALZER

Robert Stalzer

Mia edzino kaj mi estis feliĉaj pro la vizito al la ĉi-jara UK en Jokohamo, kie ni ne nur revidis la malnovajn amikojn kaj spertis novajn aventurojn, sed ankaŭ renkontis la patrion de Sepideh, kiun ŝi ne vidis dum la longaj 17 monatoj. Mia bopatrino venis de Irano kun aliaj 14 geesperantistoj, kaj tio ĝojigis ĉiujn.

“Okcidento kaj Oriento: akcepto kaj rezisto” estis la kongresa temo. Laŭteme okazis multaj programeroj, kaj diversspecaj E-grupoj pridiskutis la temon. Tamen ni ĝuis ankaŭ aliajn aranĝojn, nome: poezian vesperon, kimono-vestiĝadon por virinoj, lecionojn de tradiciaj japanaj artoj, libroservon.

Kiel kutime, okazis multaj porplezuraj programeroj. En la Kanagaŭa provinca koncertejo taiko-tamburistoj prezentis sian ludon per tamburegoj. Litova muzikteamo Asorti plenumis E-kantojn je alta profesia nivelo. Neforgesebla estis ankaŭ la Nacia Vespere de tradiciaj japanaj dancoj kaj muziko.

La kongreson entute partoprenis 1901 registritaj esperantistoj el 57 landoj, inkluzive de 31 usonaj gesamideanoj, 959 japanaj kaj 0 afrikaj. Por kunigi ĉiujn dum la Solena Malfermo oni uzis la imponan koncerthalon *Minotomiraj* situantan trans la strato de la kongresejo. La kongresejon mem apudis multaj vendejoj kaj restoracioj de la fama havenurbo. Sendube, ni kun plezuro manĝis japanajn tempuraon kaj suŝion, kaj ĝuis ankaŭ ne-japanan kuirarton. Dum la varmega aŭgusto nin refreŝigis verd-tea glaciaĵo kaj malvarma mango-suko.

La unuiginta distrikto de Tokio kaj Jokohamo posedas unu el la plej grandaj subteraj transportsistemoj en la mondo, kaj tio helpis al ni loĝi en nemultekosta hotelo je la distanco de nur du haltejoj de la kongresejo. Nia hotelo staris apud bas-

bala stadiono kaj proksime al unu el la plej grandaj ĉinaj komunumoj ekster Ĉinio. Vespere ni havis eblecon danci kun akompano de viva E-muziko kaj kun manĝaĵetoj en nefumanta etoso.

Kutime kongresejo estas fermita vendrede, ĉar tio estas ekskursata tago. Ni uzis tiun okazon por konatiĝi kun vidindaĵoj de Tokio, la japana ĉefurbo. Estis vizititaj du muzeoj, fama “Akihabara” – vigla bazaro de elektronikaĵoj, marproduktoj kaj suveniroj. Estas granda pluso por ni, ke nian turistan grupon gvidis E-ĉiĉerono.

Ĉi-jare finiĝis sesjara oficperiodo de UEA-prezidanto Renato Corsetti, kaj lin anstataŭis en tiu ĉi posteno la baratano Probal Daŝgupta, elektita unuanime por la sekvantaj tri jaroj. Estas interese ke instrukcia flugfolio enhavis konsilojn kiel helpi blindulojn.

Dum la lasta kongrestago, kantinte “La Espero”-n, ni solene fermis la 92-an Universalan Kongreson de Esperanto kaj varme adiaŭis niajn amikojn antaŭ la reveno hejmen. Rapid-trajno *Ŝinkansen* veturigis nin al la malnova ĉefurbo Kioto, kie ni pasigis kvin ripoztagojn, vizitante antikvajn templojn kaj modernajn vendejojn.

Sekure reveninte hejmen, ni estas ege feliĉaj pro la partopreno en la UK kie ni partoprenis en la Zamenhofa revo.

Libere tradukis el la angla Viktor Pajuk



KOMPLEZE DE R. STALZER



KOMPLEZE DE R. STALZER

Continuing to share in Zamenhof's dream



KOMPLEZE DE R. STALZER

Robert Stalzer

My wife and I were very happy to reach this year's UK in Yokohama, not only because we wanted to see our old friends and have new adventures, but also because Sepideh had not seen her mom for 17 months. My mother-in-law traveled from Iran with 14 other Iranians, and it was a happy occasion for everybody.

This year's theme was "*Okcidento en Oriento: Akcepto kaj Rezisto*," and there were many programs and discussion groups centered around this theme. However we also enjoyed the other kinds of programs that make an UK so fun: poetry, a chance for women to try on a traditional Japanese 'kimono,' lessons in artistic cloth-folding, the *libroservo*, and many Esperantists to meet. As at any UK, we really enjoyed the entertainment programs. At the Kanagawa Prefecture Concert Hall the taiko drummers presented one of the most exciting programs – a thundering group of large drums played with the precision of a martial arts team. Another favorite was the group "Asorti" from Lithuania, who performed several original songs in Esperanto with great musical skill. Also on the program was traditional Japanese dance and music.

The *kongresejo* was located near a large mall with many stores and restaurants in the famous harbor city of Yokohama. Of course we had many chances to eat Japanese food such as tempura and sushi,

and non-Japanese food as well. In the hot August weather it was refreshing to have some green tea ice cream and cold mango drinks occasionally.

The combined area of Tokyo-Yokohama has one of the world's largest subway systems, and this was helpful for us because we were able to stay in a more affordable hotel only two subway stations from the *kongresejo*.

Our neighborhood was near the Yokohama baseball stadium and one of the world's largest Chinese neighborhoods outside of China. But the best convenience was to be near ZAIM in the evening, a meeting place that had casual entertainment such as dancing and live music in Esperanto, refreshments and snacks for sale, and no smoking.

On Wednesdays the UK is always closed for a chance to see the city. Our threesome signed up for a day tour of Tokyo (*tuttaga ekskurso*). We visited two mu-

seums, the famous 'Akihabara' electronics market, a busy marketplace with everything including seafood and souvenirs, a temple, and many sights. As always, our private bus included an Esperanto-speaking tour guide.

There were 1811 registrants from 57 countries, including 31 from the U.S., 959 from Japan, and 0 from Africa. As in other years, there were several blind Esperantists attending, and our convention materials contained a flyer describing proper etiquette for assisting them.

The grand hall for large assemblies was across the street from the *kongresejo*. Our convention used the Yokohama Minotomirai Concert Hall for the opening and closing ceremonies, as well as some of the live entertainment planned by the local congress committee. One item of official business this year was that Probal Dashgupta of India was elected the new president of UEA, replacing Renato Corsetti. On the last day, we all sang *La Espero* to close the 92nd UK, and we said goodbye to our friends to return home.

Our threesome rode the speedy and famous Japanese "bullet" train – called the Shinkansen—to Kyoto for five relaxing days. We visited several temples and even saw some other Esperantists who had attended the UK in Yokohama. Everyone returned safely home, happy to have spent some time together, and happy to continue sharing in Zamenhof's dream.



KOMPLEZE DE R. STALZER



Por eŭropanoj la lingva problemo estas malpli abstrakta teoria afero ol por usonanoj

Russ Williams

Ekde decembro 2005 mi loĝas en Pollando, kio donas avantaĝon ke multaj Esperantaj renkontiĝoj atingeblas trajne aŭ buse, sen bezono flugi longdistance. Kutime la plej grandaj famaj tiaj eventoj (Universala Kongreso [UK]) kaj Internacia Junulara Kongreso [IJK]) okazas en Eŭropo. Ĉar ili okazis pli malproksime en 2007 (Japanio kaj Vjetnamio) kaj tial estus pli malkonvenaj kaj multekostaj, mi decidis provi alian el la multegaj eŭropaj renkontiĝoj kaj tial veturis trajne al la Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio (KEEU) en Maribor, Slovenio.

KOMPLEZE DE R. WILLIAMS



KOMPLEZE DE R. WILLIAMS

Oni fojfoje parolas pri “la esperantistaro”, sed verdire ni esperantistoj ne tiom samas! Interesis min rimarki diferencojn inter KEEU kaj UK kaj IJK kaj la jara usona kongreso, ne nur pri la celoj kaj etosoj, sed pri la ĉeestantaroj. Kvankam mi jam partoprenis plurajn renkontiĝojn en Eŭropo, do multaj homoj iĝis konataj de mi, KEEU prezentis plejparte nekonatajn de mi (sed longtempajn) esperantistojn. (Nu kompreneble estis ankaŭ kelkaj amikoj de pasintaj UK-oj kaj IJK-oj, kiuj ankaŭ decidis ne veturi al Azio ĉi-jare.)

La fama UK, kompreneble, estas la plej granda jara renkontiĝo en Esperantujo, ofte

kun pli-malpli 2000 homoj, kaj tre granda serioza diverstema programo kiu traktas kulturon, literaturon, arton, sciencan, oficialajn burokrataĵojn ktp. IJK kutime allogas kelkcent homoj kaj havas pli distran gajan programon, celante ludemajn festemajn gejunulojn. Ĉi tiu KEEU similgrandis al IJK (256 aliĝis), sed havis pli altan averaĝan aĝon kaj pli seriozan fakan fokuson, ĉar ĝi fakte estas kunveno de Eŭropa Esperanto-Unio. Kutime ĝia programo temas specife pri eŭropa politiko, specife pri lingvaj problemoj, kun prezentoj de diversaj lingvistoj, politikistoj ktp. Ĉi-jare estis unuan fojon aldona fakprogramo pri akvo kaj rilataj temoj (protekto de naturo, Esperantaj fakterminoj pri birdoj ktp). Ĉiuj tiuj aranĝoj pli grandas kaj pli internacias ol la usona kongreso (ĉ. 100 kongresanoj) kiu ĉiam havas buntan diversan programon, sed ne la internacian etoson.

En KEEU la lingvan programon prezidis Seán Ó Riain, prezidanto de Eŭropa Esperanto-Unio, kiu servis profesie kiel irlanda diplomato. Inter la prelegantoj estis efektive du esperantistaj membroj de la Eŭropa Parlamento: Małgorzata Handzlik de Pollando kaj Ljudmila Novak de Slovenio.

Por eŭropanoj la lingva problemo estas malpli abstrakta teoria afero ol por, ekzemple, usonanoj. Mi spertas ĝin en mia ĉiutaga vivo nun, sed mi ne naskiĝis nek plenkreskis en tia ĉirkaŭaĵo. Dum mia aŭskultado en la lingvaj prelegoj mi konstatis ke iusence mi (la sola usonano, kun plejparte unulingva vivsperto en Usono) ne plene komprenas la eŭropan sperton pri lingva diverseco, kvankam mi scias multajn faktojn pri la afero. Oni, kompreneble, prezentis statistikojn pri la kreskado de la oficiala lingvaro de EU (jam 23 lingvoj, kaj

pli multaj oficialiĝos!), pri la rezultaj kostoj kaj malfacilaĵoj, pri la fakto ke la angla nejuste pli potencas ol la aliaj supozeble egalaj oficialaj lingvoj, kaj pri tio kiel Esperanto povus helpi la komplikan situacion.

Rilataj temoj inkluzivis tion, kio okazus se EU akceptus Esperanton kiel ian oficialan aŭ pontan lingvon. Kiel tio influus Esperanton mem? Ĉu Esperanto iĝus eĉ pli eŭropeca (jam ofta kritiko kontraŭ Esperanto)? Ĉu EU-akcepto helpus aŭ malhelpus antaŭenigi la lingvon en aliaj mondopartoj?

Alia interesa afero pli konata por eŭropanoj ol usonanoj estas tio ke la landlimoj tiom ofte ŝanĝiĝis inter eŭropaj landoj, ke estas interesaj situacioj kiel, ekzemple, multaj slovenoj, kiuj ĉefe parolas la slovenan, sed loĝas en najbara germanlingva Aŭstrio kaj konsideras sin aŭstrianoj. (Kompreneble tiaj situacioj rezultas ankaŭ pro migrado, sufiĉe konata fenomeno por usonanoj!)

Krom tiaj seriozaj diskutoj ankaŭ okazis distra programo, do simila al aliaj Esperantaj renkontiĝoj. Menciindas Esperantaj koncertoj (de furora franco JoMo; polo Georgo Handzlik; hungaro Attila Schimmer); Esperantaj teatraĵoj (“Stilekzercoj” de franco Henri de Sabates; sciencfikcia parodio de kroata studenta grupo; biografia skeĉo pri Galileo de serboj Saša kaj Ana Piliopović); anglaj kaj polaj filmoj kun Esperantaj subtekstoj; klasika piana koncerto; poezia deklamado; iomete da dancado, kunkantado kaj tabul-ludado; grup-ekskursoj en la regiono ktp.

Maribor mem estis tre agrabla urbeto. Vesna Obradović kaj la aliaj LKK-anoj bone aranĝis kelkajn eksterkongresajn urbajn surprizojn por ni: niaj kongresaj nomŝildoj

Evento	Tipa Grandeco	Ĉeestantaro	Programa stilo
UK	Du mil	Ĝenerala, internacia	Tre granda kaj diversa
IJK	Kelkcent	Juna, internacia	Diverse gaja
KEEU	Kelkcent	Pli maljuna, Eŭropa	Lingva, politika
Usona E-Kongreso	Cent	Usona	Diversa



KOMPLEZE DE R. WILLIAMS

donis rabatojn aŭ senpagajn uzojn de la urbaj busoj, la akvaria zoo, la urba muzeo, artgalerio ktp. Krome estis Biergardeno kun verda “Esperanta” biero, glaciaĵejo kun menta “Esperanta” oferto kaj bonega itala restoracio kun tuta Esperanta traduko de sia tre ampleksa menuo! La kongresejo mem havis tagmanĝan servon kiu eĉ ofertis vegetaraĵojn. Estis aparta kunvenejo (en ia inter-

reta kafejo) kie estis rondtablaj diskutoj pri diversaj temoj (la Biblio, Linukso ktp), malgranda libroservo, senpaga komputila uzo, tabulludado ktp. Inŝpiritaj de la sperto pri KEEU, la mariboranoj esperas gastigi venontan IJK en Maribor.

Ĉar diversaj kongresaj eventoj okazis en diversaj lokoj en Maribor, ni ofte piediradis tra la urbocentro, do ni ekkonis la urbeton. En Maribor loĝas iom pli ol cent mil homoj. La urbocentro havas multajn senaŭtajn stratojn, do homoj agrable piediras trankvile kaj plezure. Norde de la kongresejo estis nekredeble granda bela urba parko, kiu havas malgrandan akvarian zoon (kun fiŝoj kaj reptilioj) kaj ĉiumerkredan senpagan jogon kun kelkcent jogemuloj! La urbocentro havas multe da interesa arĥitekturo. Krome mi rimarkis nekutime multajn skulptaĵojn kaj statuojn ĉie en la urbocentro, kio tre plaĉis al mi. Mi dirus ke multaj usonaj urboj povus lerni pri urba planado de Maribor. Eble ankaŭ menciindas ke Maribor havas la plej bonan meksikan restoracion kiun mi trovis en Eŭropo post mia transloĝiĝo el Teksaso.

Slovenio estas malgranda lando kun du



milionoj da enloĝantoj. La slovena lingvo estas parto de la slava familio. Mi lernas kaj konetas la polan, kaj plaĉis al mi povi legi kaj kompreni multajn slovenajn tekstojn (sed ne la paroladon!). Kiel en multaj landoj kun malvaste parolata nacia lingvo, multaj slovenoj parolas plurajn lingvojn. Do pluraj lokanoj povis paroli angle, sed certe ne nepre, kaj plurfoje homoj provis la germanan por paroli kun mi.

Survoje, mi havis ŝancon pasigi plurajn horojn vagante en Ljubljana, la ĉefurbo de Slovenio. Ĝi pli grandas kaj ankaŭ belas, kun monteto en la mezo sur kiu situas interesa kvazaŭruinaĵo, restaĵo kiun oni renovigis por krei intersajn muzeojn, artgaleriojn kaj observan turon de kie oni povas vidi la vastan urbon.

Sume: kaj KEEU kaj Slovenio tre plaĉis al mi. Mi ĝuus ĉeesti KEEU denove, kaj certe esperas reviziti Slovenion.

Esperanto en la 21-a jarcento: la stato kaj perspektivoj

Viktor Pajuk

La 29-30-an de junio en Ternopila V. Hnatjuk universitato (Ukrainio) okazis scienca konferenco “Esperanto en la 21-a jarcento: la stato kaj perspektivoj, omaĝe al la 100-jara datreveno de E-lernolibro por ukrainoj de Miĥajlo Jurkiv”. Ĝin organizis Ternopila E-klubo “Spinofloro”, Bonfara fonduso de V. Eroŝenko “Espero”, UkrEA kaj sciencistoj de la universitato. La unua ukrainlingva E-lernolibro, aperinta en 1907, estas la reala simbolo de aliĝo de ukrainoj al la atingoj de la tutmonda interlingvistika penso.

En la prelegoj oni substrekis la historian signifon de la unua E-lernolibro kaj sekvintaj lernolibroj por la nacia kaj kultura renaskiĝo en Ukrainio kies partoj komence de la 20-a jarcento apartenis al Aŭstro-Hungaria kaj Rusia imperioj. Tre bone estis montrita la rolo de la

tradukitaj verkoj de T. Ŝevĉenko, la fabeloj kaj legendoj de V. Eroŝenko, la popolaj kantoj, la ukraina E-periodaĵo por konatigi E-mondon kun riĉa ukraina kulturo; oni konvinke parolis pri efika uzado de Esperanto en la branĉo de la turismo, pri perspektivoj de Esperanto en Eŭropa Unio kaj internaciaj rilatoj. Estis prezentitaj la unuaj en Ukrainio monero (interesiĝo turnu sin al la aŭtoro) kaj kvar poŝtmarkoj. Sufiĉe interesa



estis la ekspozicio en la provinca muzeo: la raraj libroj, periodaĵoj, programoj ktp.

Leganto de Esperanto USA eble demandos: nu, kaj kio, ĉiumonate, eĉ, ĉiusemajne okazas io simila en la Esperanto-mondo. Respondo estas simpla: kvar artikolojn por la prelegkolekto preparis tri membroj de la Esperanto-so-



cieto de Ĉikago: M. Jones, d-ro L. Kordylewski kaj V. Pajuk (2).

La konkludaj pensoj rilate al la konferenco: la scienca kaj organiza nivelo estis sufiĉe alta (partoprenis ses doktoroj de sciencoj, multnombraj samideanoj el ok universitat-urboj de Ukrainio; gravas ke estis aliĝintaj aŭtoritatoj el ekster-movada medio; estis akceptita la rezolucio kun rekomendoj pri disvolviĝo de Esperanto en Ukrainio; estis eldonitaj materialoj en la ukraina lingvo kaj Esperanto. Grandan dankon al la organizantoj de la konferenco, kiu jam konstruis imag-ponton inter la pasinteco kaj estonteco!

Viktor Pajuk estas prezidanto de la Esperanto-societo de Ĉikago

Dr. Esperanto



Stan Buchholtz

It surely is a source of great satisfaction when the pleasure of separate interests or hobbies can be combined into a single project.

I became enthralled with puppetry while on an extended visit to my uncle Oskar in Munich, Germany, during WWII. He had just returned on leave from Army service on the Russian front, and, to my surprise and joy, dusted off and set up what to my wondering eyes was a fairly elaborate marionette theater in the doorway of a room opposite the bedroom my mother and I had the use of. The intervening hallway was sufficiently spacious to permit the setting up of several chairs to accommodate an audience of family and neighborhood friends.

My uncle had been able to acquire his puppets scenery, and play scripts from a specialty shop in Munich, and taught me how to operate the approximately one foot tall figures well enough to participate in putting on production of plays such as *Aladdin*, *Ali Baba & The Forty Thieves*, *The Flying Dutchman*, and *Der Freischuetz*. I remember devising some special effects to simplify several rather cumbersome procedures my uncle had been using, much to his satisfaction.

Working with my cousins and uncle during those few weeks of his leave have remained as some of the most

pleasant memories of my childhood, and inspired me to enthuse my own son with the creative joy of puppetry.

As such interests so often do, the creative urge recently re-emerged with the desire to build a one-third human size marionette with a moving mouth mechanism. The decision as to the identity of the figure, however, remained elusive for some time, until I was rewarded with a flash of inspiration.

I have been an avid student of the international second language Esperanto for a number of years, being a firm believer in the value of having a common and neutral medium of communication to help promote better worldwide understanding and reducing friction between nations of different cultures on a grass-roots level. The creator of Esperanto was a Polish physician who, in 1887, published a small booklet he called the "International Language," under the pseudonym of "Dr. Esperanto" (one who hopes). Interest in the language grew rapidly, and he soon became known by his pen name.

Here was the very identity for my marionette! After acquiring as many books on puppet construction I could find, I went to work, and soon became the proud father of my diminutive hero.

Today, he is serving two causes, by being used both to promote puppetry in education, as well as in the use of Esperanto to promote world peace, and appearing in schools and service organizations, with the fervent hope that he will achieve at least in some modest proportion, the great dream of his heroic human counterpart, Dr. Ludovic Zamenhof.

This article was published in *The Puppetry Journal*

Saluton el Oklahomo!

Estis plesuro renkonti multajn el vi ĉe la Landa Kongreso. Se vi planas instrui (aŭ jam instruas) Esperanton ĉi-aŭtune, bonvolu plenigi la suban enketilon kaj sendi ĝin al: Beth Magallón, 1103 Turpin Lane, Tahlequah, OK 74464, aŭ skribu retroŝte al magallon@intellex.com. La informoj kiuj mi ricevos antaŭ la fino de oktobro 2007 aperos en la jarfina raporto. Mi multe dankas ĉiujn pro la bona kunlaboro.

ENKETO

Nomo de la instruisto _____

Retadreso de la instruisto _____

Loko kie la kurso okazos (as): Urbo _____ Ŝtato _____ Lando _____

Kampuso/lernejo/konstruaĵo _____ Kosto de la kurso _____

Nivelo (*cirkluj*): komencanta / progresanta / alta nivela / konversacia rondo / alia _____

Dato de la komenco de la kurso _____ Dato de la fino de la kurso _____

Kiom da lecionoj _____ Kiom da tempo daŭros ĉiu sesio _____

Uzataj lerniloj: libroj: _____

vidbendoj/DVD-oj: _____

aŭdbendoj: _____

aliaj materialoj: _____

retejoj (ekz., <lernu.net> ktp.) _____

Kiel vi reklamas (os/is) la kurson? _____

Ĉu vi, kiel instruisto, uzas retejojn por pretigi la lecionojn? Se jes, kiu(j)n? _____

Ĉu viaj lernantoj uzas retejojn por studi? Se jes, kiujn? _____

Ĉu vi konsiderus dividi la materialojn, kiujn vi kreis por instruado, kun aliaj instruistoj? Se jes, bonvolu priskribi la preparitajn materialojn: _____

Ĉu mankas al vi materialoj kiujn vi bezonas por instrui? Se jes, kio mankas? _____

Kion vi bezonas por la klaso? _____

Ĉu vi havas lernolibrojn aŭ aliajn librojn aŭ materialojn por instrui, kiujn vi volonte donus al iu al kiu mankas instrumaterialoj? Se jes, kio ĝi estas? _____

Komentoj: _____

Denove, multajn dankojn al ĉiuj! Havu bonan lernejan jaron! Bonvolu komuniki al mi viajn pensojn, ideojn kaj demandojn.

De la Usona Ĉefdelegito de UEA

William R. Harmon

Pri kotizoj por membreco en UEA por 2008: Kvankam ĉiu membro de Esperanto-USA ene de kelkaj monatoj ricevos realigilon kiu donas la saman informon, estus bone doni al vi antaŭrigardon rilate al la prezoj.

Membro-Gvidlibro:\$12 (ne donas individuan membrecon en UEA, kaj oni ricevas nur parton de la Jarlibro)

Membro-Jarlibro:\$29 (individua membreco en UEA, kaj oni ricevas la tutan Jarlibron; membroj ĝis inkluzive 29-jaraĝajn ricevas ankaŭ la gazeton *Kontakto*)

Membro-Abonanto:\$72 (individua membreco en UEA, kaj oni ricevas la gazeton *Esperanto* ĉiun monaton, plus la Jarlibron; membroj ĝis inkluzive 29-jaraĝajn ricevas ankaŭ la gazeton *Kontakto*)

Simpla Abono:.....\$43 (abono al la gazeto *Esperanto*, sen membreco en UEA)

Abono al Kontakto:\$26 (abono al la gazeto *Kontakto*)

Societo Zamenhof:\$144 (mecenata kategorio, aldona al alia kotizo).

La retpaĝo de UEA donas multajn pli-

ajn informojn pri UEA: www.uea.org.

Dum ni mencias kotizojn, jen konciza listo de la kotizoj por Esperanto-USA (antaŭe nomata ELNA). La plena listo kun klarigoj estas videbla en la retpaĝo www.esperanto-usa.org.

Individua Membreco.....\$40

Junula Membreco.....\$20

(ĝis 27-jaraĝaj)

Familia Membreco\$60

Subtena Membreco\$80

Patrono de E-USA\$120

"Friendship Doubler"

Membreco\$250

(Dumvive \$5000)

"Peace Builder"

Membreco\$500

(Dumvive \$10 000)

Dumviva Membreco\$800

(Dumvive \$2400)

Zamenhof-Societo de Usono \$1000


(Dumvive \$20 000)

Jarmila Zamenhof Societo \$2000

(Dumvive \$40 000).

Pri la Delegita Reto de Usono

Ni perdis longtempan kaj tre fidelan Delegiton en Los Angeles pro la morto de Peggy Zarchy en septembro. Mi havis la plezuron koni Peggy dum preskaŭ 50



jaroj, kaj ja sentos la mankon.

La nova Delegito en Los Angeles estas Alexander Rybalov, antaŭe fakdelegito.

La delegiteco en Portland, Maine, vakas pro translokiĝo de William Harris, kiu nun estas la nova Direktoro de la Centra Oficejo de Esperanto-USA. Vilĉjo estiĝas Delegito en Emeryville.

Korespondi deziras

kun samaĝuloj (aliaĝuloj ankaŭ bonvenas), nur paper-poŝte.

Katalin PERCZEL-SZABÓ. 8200 Veszprém Eötvös u. 17. Veszprém, Hungario. Ret-adreso: kankalin76@freemail.hu. Mi estas 31-jaraĝa virino, progresanto. Mi estas instruistino. Interesoj: origamio, literaturo, religioj, fabeloj, ludoj. Mi atendas leterojn kaj paperpoŝte, kaj retpoŝte, pri iu ajn temo.

Krisztina VEREB. Debreceno, Hungario. Ret-adreso: ve.krisz@freemail.hu. Mi estas 23-jaraĝa virino, komencanto, studentino. Interesoj: geografio kaj aliaj temoj.

Honore SEBUHORO. C/O PO BOX 08 BUNAGANA-KISORO/UGANDA. Retadreso: honsebn@yahoo.fr. Mi estis baptita de 1984 kaj mi esperantistiĝis antaŭ du jaroj. Mi havas edzinon kaj 3 gefilojn kaj mi estas instruisto. Mi ŝatus korespondi kaj interŝanĝi fotojn kun kristanoj el Usono.

Forpaso de Peggy Zarchy


Margaret "Peggy" Zarchy, naskita 1922.03.30, mortis la 22-an de septembro 2007 en Los Angeles, California, Usono. Peggy estis la Delegito de UEA en Los Angeles dum multaj jaroj, Dumviva Membro de UEA, kaj longtempa kaj fidela membro de Esperanto-USA (antaŭe ELNA). Ŝi estis aktiva membro de la E-klubo de Los Angeles ekde la 1970-aj jaroj, kaj estiĝis DM en 1981. Ŝi ĉeestis kelkajn Universalajn Kongresojn de Esperanto, la unuan en Braziljo en 1980. Ŝiaj multaj amikoj kaj samideanoj ĉirkaŭ la mondo bedaŭras ŝian forpason. Ŝin postvivas edzo Zach Zarchy, konata usona muzikisto, kaj filino Carey Hetmansberger.

Bruno POLO-RIVA. Centre Agricole de Casabianda, 20270 Aleria Corsica, Francio. Mi estas komencanto. Interesoj: muziko, amikoj, literaturo, lingvoj: rumana, hispana. Mi volas korespondi paperpoŝte.

GONG Wenliang. 1-3-102, Xingtai Beili, Nanfeng Lu, Nankai Qu, TIANJIN, 300193, Ĉinio. Ret-adreso: wenliang_gong@163.com. Mi estas 58-jaraĝa viro, meznivela esperantisto. Interesoj: kolekti esperantaĵojn kaj filatelajojn; lerni romaan lingvon. Mi deziras korespondi kun romaĵoj (ciganoj) kaj amikoj el la tuta mondo paperpoŝte aŭ retpoŝte.

Lenke SZASZ. RO-537240 Praid, str. Principialna nr 130, Jud. Harghita, Rumanio. Mi estas 60-jaraĝa virino, emeritiĝinta, bonnivela esperantistino, instruistino de la rumana kaj hungara lingvoj. Interesoj: literaturo, artoj, naturo. Mi amas literaturon, artojn, naturon kaj sincerajn homojn. Mi deziras korespondi

La grandeco de D-ro L. L. Zamenhof*



Prof. D-ro Ivo Lapenna

Antaŭ 100 jaroj — precize la 15-an de decembro 1859 — naskiĝis homo, kiu supervivis sin mem. La spertoj de intergenta sangado en Bjalistoko de lia infanaĝo inspiris lin al la suproj de sublime altruisma sindediĉo por la bono de ĉiuj homoj. La kruelaj malfeliĉoj, surverŝitaj grandparte de lingvodiverseco sur tiun terpeceton inter Okcidento kaj Oriento, kuraĝigis lin serĉi kaj trovi solvon por la lingva problemo en kadroj mondaj.

Lazaro Ludoviko Zamenhof estis Judo: membro de tiu popolo suferanta, kiun jarcentaj persekutoj kaj torturoj hardis kaj multtrilate nobligis, kaj kies filoj donis al la kulturo kaj ĝenerala progreso nombron da eternaj valoroj. Lia patrolando estis Pollando, sed en la oficialaj registroj li estis enskribita kiel civitano de la Rusa Imperio, ĉar la krucumo de Pollando donis tiun regionon al la caroj. Sed Zamenhof, restante fidela al sia gento kaj patrujo,

samtempe tamen leviĝis super sia popolo, super sia ŝtato kaj fariĝis loĝanto de la mondo, apartenanto de la homaro.

Naskita en medio modesta, humila laŭ sia karaktero, li grandiĝis per sia verko kaj fariĝis personeco de formato tutmonda. Kaj hodiaŭ, cent jarojn post lia naskiĝo, lia nomo estas solene festata en ĉiuj landoj. Prezidantoj de respublikoj, ĉefministroj kaj ministroj, grandaj sciencistoj, lingvistoj kaj Nobelpremiitoj, artistoj, verkistoj kaj poetoj, edukistoj kaj kulturaj agantoj de diversaj landoj, de malsamaj politikaj

sistemoj, religiaj kredoj kaj filozofiaj konvinkoj unuiĝis por patroni omaĝon de la homaro al homo, kies tuta vivo, ĉiuj intelektaj energioj kaj fizikaj fortoj estis dediĉitaj al ĝia pli granda feliĉo.

En kio konsistas la grandeco de Zamenhof? En julio de la jaro 1887 aperis en Varsovio la unua lernolibro de la Internacia Lingvo por Rusoj. La 40-paĝa libreto konsistas el antaŭparolo, plena gramatiko kaj vortaro Internacia-Rusa kun klarigoj pri ĝia uzo. Ĝi estis la rezulto de multjara laborado.

El tiu malgranda semeto elkreskis en iom pli ol sep jardekoj fortika arbo kun profundaj radikoj, abundaj branĉoj kaj densa foliaro. Ĝi estas nekontestbla fakto. Spitante ĉiujn obstaklojn — antaŭjuĝojn, rasismojn kaj ŝovinismojn, militojn, misprezentojn, rektajn malpermesojn kaj ne malofte persekutojn — la Internacia Lingvo traboris al si la vojon en ĉiujn partojn de la mondo, penetris en ĉiujn sociajn tavolojn, konstante riĉiĝadis per nova kul-

tura enhavo kaj, paralele, daŭre interne evoluadis. El genia projekto ĝi transformiĝis en nuancoplenan instrumenton de pensado kaj komunikado. Ĝi fariĝis vivanta lingvo, kun tute propra spirito, de vivanta internacia kolektivo.

Antaŭ Zamenhof multaj — inter ili kelkaj veraj gigantoj de la homa penso — serĉis konvenan solvon de la lingva haoso. Post Zamenhof pluraj aliaj klopodis — ĉu pro persona gloremo, ĉu pro nescio aŭ nekompreno de la problemo — ankoraŭfoje malkovri jam malkovritan Amerikon. Kelkfoje tiuj provoj elvokis iom da publika interesiĝo kaj kreis iom da konfuzo. Plej ofte restis senefikaj. Neniu el ili sukcesis firmiĝi. Neniu transpasis la limojn de teorie pli aŭ malpli taŭge planita projekto. Neniu socie enradikiĝis. Kaj pli aŭ malpli baldaŭ — kutime depende de la disponeblaj financaj rimedoj — malaperis unu post la alia en la mallumo de la forgeso.

Kial, do, Esperanto sukcesis, dum ĉiuj aliaj projektoj de komuna lingvo, kvankam kelkfoje verkitaj de rekonitaj lingvistoj kaj apogataj de famaj nomoj, fiaskis? La kaŭzoj estas pluraj, sed tri el ili ŝajnas al mi esencaj:

1. Zamenhof bone komprenis, ke lingvo internacia devas konsisti el elementoj *maksimume internaciaj*. Tial li metis en ĝian vortaron radikojn jam internaciigintajn kaj signis la vojon por plua riĉiĝo de la lingvo per novaj internaciaj esprimoj. Sed li ankaŭ perfekte komprenis, ke lingvo ne konsistas nur el vortoj; plue, ke unuflanke, ne ekzistas absoluta internacieco de la vortoj — nek laŭenhave, nek laŭforme — kaj ke, aliflanke, por atingi facilecon estas necese ordigi kaj sistemigi tiun internacian lingvomaterialon kaj liberigi ĝin de balastaj akcesoraĵoj kaj absurdaĵoj.

Nur iom post iom Zamenhof solvis tiujn demandojn, pri kiuj li okupiĝis ekde siaj plej junaj jaroj. Lia grandioza verko estas sendube rezulto de eksterordinara talento, sed same tiel ankaŭ de senfina pacienco kaj diligento. En la komenco la komplikaj gramatikoj de la lingvoj, kiujn li sciis, kaj iliaj dikegaj vortaroj timigis lin. Kelkfoje li efektive malesperis, sed ĉiam denove li provadis, kreadis, serĉadis la solvon.

Lernado de la angla lingvo montris al li, ke eblas simpligi la gramatikon ĝis maksimumo. Hazarda rimarko de surskribo “sukeraĵejo” donis al li la ideon kiel, per bone planita sistemo de afiksoj, solvi la problemon de tro multaj vortoj. Restis ankoraŭ la demando de la vortradikoj. Unue li pensis, ke la vortojn oni povas tute simple inventi. Nur poste li rimarkis, ke granda nombro da vortoj jam internaciigis en la normala evoluprocezo de la lingvoj. “Mi baldaŭ rimarkis — li skribis al Borovko — ke la nunaj lingvoj posedas grandan provizon da pretaj vortoj jam internaciaj, kiuj estas konataj al ĉiuj popoloj kaj faras trezoron por estonta lingvo internacia — kaj mi kompreneble utiligis tiun ĉi



Dro Ivo Lapenna

trezoron.”

Surbaze de tiuj principoj, kies ĝustecon li mem elprovdadis dum multaj jaroj tradukante kaj verkante en sia lingvoprojekto, la fundamento de la Internacia Lingvo ricevis sian definitivan formon. Ĉio en tiu fundamento estas bone pripensita kaj antaŭe elprovita en la praktiko. Ĉio celas krei bazon de plena lingvo, efektive internacia laŭ sia interna strukturo kaj ĝis maksimumo facila. Tial, ekzemple, Esperanto havas fonetikan ortografion. Tial en ĝi ĉiu elemento ricevis difinitan signifon kaj la tuta lingvo aglutinan karakteron kun plej simpla gramatiko. Per la sis-

temo de afiksoj la Internacia Lingvo akiris vastajn eblecojn de subtila derivado. Tio unuavide kelkfoje iom ĝenis la t.n. “tujan kompreneblecon”, per kiu kelkaj pseŭdosciencaj fabrikantoj de novaj projektoj provas blufi personojn parolantajn plurajn okcidenteŭropajn lingvojn, sed ĝuste tio donas al la lingvo multe pli grandan, *veran* kaj *realan*, internaciecon: ne, kompreneble, el vidpunkto de difinita nacio aŭ grupo da nacioj kaj de iliaj intelektaj satelitoj, sed el vidpunkto monda. Samtempe tiuj karakterizoj helpas la rapidan ellernon de la lingvo kaj ebligas ĝian tujan praktikan uzon skribe, lege kaj parole ne sole en Okcidento, sed sur ĉiuj kontinentoj; ne nur fare de kleruloj, sed ankaŭ fare de la plej ordinaraj homoj.

La moto “Por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas ĝin nomi tia”, presita sur la kovrilpago de la unua lernolibro, entenas fundamentan principon de unuaranga graveco.

2. Lingvo estas *socia fenomeno*. Por ke ĝi povu meriti la nomon de lingvo, ĝi devas kontentigi ĉiujn bezonojn de pensespri-mado de difinita homgrupo. Tio signifas, ke ĝi ne povas esti limigita nur al

scienco aŭ nur al kiu ajn alia speciala fako, sed ĝi devas rilati al ĉiuj homaj aktivecoj. Tio plue signifas, ke ĝi povas esti evoluigata ne de tiu aŭ alia unuopulo — eĉ ne de la plej genia — sed nur de la tuta kolektivo, kies spirita proprieto ĝi estas, surbaze, de la efektivaj bezonoj, de tiu kolektivo. Ankaŭ tiun grandan veron Zamenhof bone komprenis. Li tuj “forcedis ĉiujn personajn rajtojn” je la lingvo kaj akcente deklaris jam en la unua lernolibro: “Internacia Lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia”. Precize tia ĝi estis kaj estas konsiderata de tiu internacia kolektivo, kiu ĝin akceptis ne por

eksperimente aŭ lude pasigi la tempon dum ripozo neniofarado, sed por utiligi ĝin en siaj internaciaj rilatoj.

Laŭ tiu korekta principo la lingvo efektive evoluis “per tiu sama natura vojo”, per kiu evoluas “ĉiu alia lingvo”, kiel diris Zamenhof en la jaro 1910. Sed li povis prave konstati jam en 1908: “Nia lingvo konstante pli riĉiĝas kaj elastiĝas. Iom post iom konstante aperas novaj vortoj kaj formoj, unuj fortikiĝas, aliaj ĉesas esti uzataj. Ĉio fariĝas kviete, senskue kaj eĉ nerimarkeble”. De tiam laŭ la sama maniero la lingvo plue konsiderinde evoluis kaj samtempe fortikiĝis ĝia interna unueco kaj kohereco pro la ampleksiĝo kaj daŭra multobligado de ĉiaspecaj internaciaj kontaktoj inter ĝiaj uzantoj.

3. Sendube, la lingvaj malfacilaĵoj troviĝas en la radikoj mem de la ideo de komuna supernacia lingvo. Sed tiuj malfacilaĵoj fariĝas objektivaj obstakloj kaj sentiĝas kiel tiaj ĝuste tial, ĉar oni ekkonceptas la homaron kiel principe unuecan kaj la mondon kiel principe tutecan. Animo delikata kiel tiu de Zamenhof ne povis ne eksenti tion, des pli ke li naskiĝis, edukiĝis kaj vivis en medio plurnacia, saturita de reciprokaj intergentaj antagonismoj. Tute nature, do, li enspiris en la lingvon spiriton de humaneco kaj internaciismo. Ankaŭ tiurilate lia subjektiva penso harmonie akordis kun la objektivaj formiĝantaj kondiĉoj.

Jam en la jaro 1878, kiam Lazaro Ludoviko estis ankoraŭ lernanto en gimnazio, li kaj liaj junaj kolegoj entuziasme kantis en la unua, ankoraŭ ne ellaborita projekto de komuna lingvo:

*Malamikete de las nacjes
Kadó kadó, jam temp' está.*

Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! Por Zamenhof komuna tuthoma lingvo neniam estis celo al si mem, sed unu el la plej gravaj rimedoj por forigi la miskomprenojn, suspektojn kaj malamon inter la popoloj, por krei kondiĉojn de interkompreniĝo kaj reciproka respektado. La esenco de tiu ideo estas koncize esprimita en unu sola simpla frazo, kiun li eldiris en sia rimarkinda parolado en Bulonjo-sur-Maró tiun gloran tagon de la jaro 1905, kiam la unuan fojon en la historio de la homaro homoj de diversaj nacioj interkompreniĝis per komuna supernacia lingvo: “Ni konsciis bone la tutan gravecon de la hodiaŭa tago, ĉar hodiaŭ inter la gastamaj muroj de Bulonjo-

sur-Maró kunvenis ne Francoj kaj Angloj, nek Rusoj kun Poloj, sed homoj kun homoj”.

Zamenhof tamen ne supertaksis la rolon de la lingvo, kiel kelkfoje neinformitaj personoj klopodas kredigi. En Ĝenevo, en 1906, li precizigis:

“Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restos malbonaj; sed ni kredas, ke komuniĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de sinnekonado kaj de devigata sinaltrudado”.

La humaneca internaciismo — hodiaŭ praktikata kaj flegata en sia plej pura formo inter la personoj parolantaj la Internacian Lingvon — estis kaj estas potenca idea fono de la lingvo. Ĝi donis al la Internacia Lingvo koron kaj animon, tute

specialan karakteron kaj apartan fizionomion. Kaj sen tiuj neniuj lingvo povas vivi, kreski kaj maturiĝi.

La tri tuŝitaj elementoj kaŭzis la plenan sukceson de Esperanto el lingva vidpunkto. Ili estas unu el la garantioj por la plua disvastiĝo kaj evoluo de la Internacia Lingvo, por ĝia ĉam pli ampleksa apliko en la internaciaj rilatoj, por ĝia estonteco. Tia efektive *internacia* lingvo estas samtempe baza rimedo de integriĝo en supera homara tuto, sed tiel ke samtempe estu konservitaj la individuecoj de ĉiuj nacioj, de la naciaj kulturaj valoroj kaj de iliaj plej grandaj trezoroj: la naciaj lingvoj.

Cento da placoj kaj stratoj tra la mondo hodiaŭ portas la nomon de D-ro L. L. Zamenhof. Monumentoj estas starigitaj al li en diversaj lokoj. Ne plu ekzistas enciklopedio aŭ serioza lingvistika verko, kiu ne menciis la iniciatinton — kiel li mem sin nomis — de la Internacia Lingvo. Ofte oni diras, ke tiu aŭ alia grandulo de la spirito vivas plue tra la daŭra valoro de sia verko.

Sed se pri iu tiu diro estas ĝusta, tiam certe unuavice pri Zamenhof. Ĉar li plue ekzistas kaj ekzistos en la estonteco tra la lingvo, kies fundamentojn lia genio donacis al la homaro kaj kiu hodiaŭ vivas en la abunda kaj daŭre kreskanta tutmonda literaturo, en la gazetaro kaj revuoj, sur la ondoj de radio kaj ekranoj de televido, en kongresoj kaj konferencoj, en internaciaj amikaj rondoj kaj eĉ en familioj, sur la lipoj de miloj kaj miloj da personoj tra la mondo, alportante tien, kien ĝi penetris, almenaŭ iom de tiu bonvolemo, kiu enspiris en ĝin la nobleco de homo kun granda animo kaj profunda menso el Bjalistoko. Jes, monumentoj estas starigitaj al Zamenhof, sed la plej grandan kaj la plej belan monumenton li starigis al si mem per sia verko.

Tio ĉi estas elĉerpaĵo el la *Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro*, eldonita en 1960 (UEA), el la privata kolekto de Frans Jahger.

James Lieberman

En ĉi tiu puzlo ĉiuj vortoj estas prenitaj de la poemo de Zamenhof "Ho, Mia Kor'".

Horizontale


- 3. Grava, determina.
- 6. Ĉiutaga neferia afero.
- 9. Kie troviĝas la mamoj.
- 11. Ne lasi.
- 13. Daŭra, ne kurta.
- 14. Kiam io ne mankas estas...
- 17. Pace.

Vertikale

- 1. Prefikso, ne?
- 2. De la aŭtoro mem.
- 4. Aŭtoro, doktoro...
- 5. Io centra, enda: poezie.
- 7. Kaŭzi sonon, eble vundon (imperative).
- 8. Ne ĉi tie.
- 10. Ek, supren!
- 12. Gajnos, atingos.
- 15. Kun plezuro, sen streĉo.
- 16. Temp-mezur'

(la respondoj al tiu ĉi krucvortenigmo troviĝos en la sekva numero)

KORO VERDA



New from the Book Service

**DICCIONARIO AMIKA VORTARO ESPAÑOL-ESPERANTO ES-
PERANTO-HISPANA.** *Miguel
GUTIÉRREZ ADÚRIZ.* Very useful

“pocket”-sized dictionary, for Spanish speakers. Includes correlatives, affixes, other tables. Contents are based on de Diego’s *Gran diccionario Español-Esperanto* and the *Nova plena ilustrita vortaro de Esperanto*. 2007. 450p. 170x110. Paper. Spain. ISBN 84-920931-5-3.

DIC004

\$22.70

**ESPERANTO, EL: LENGUA Y
CULTURA.** *Antonio VALÉN.* El

desconocimiento general sobre el Esperanto – incluso entre los lingüistas – resulta sorprendente en un país que, como el nuestro, cuenta con unos diez mil hablantes de esta lengua. El presente informe nace con la vocación de suplir esta carencia mediante datos concisos, pero completos y rigurosamente verificables. Para facilitar una consulta más rápida del libro, se ha incluido un resumen al final de cada capítulo. 2004. 191p. 210x130. Paper. Spain. ISBN 84-920931-4-5.

ESP055

\$22.70

FLAVA HUNDO, LA. *Georges
SIMENON.* Trans. by Daniel Luez.

One of the earliest novels, dating from 1931, in the enduring and popular series about French detective Inspector Maigret. 2007. 120p. 200x140. Paper. Russia.

FLA004

\$16.40

**HISTORIO POR MALFERMI ES-
TONTECON.** *Various authors.*

Trans. by an international committee. A textbook of the modern history of China, Japan and Korea, primarily covering the period from the middle 19th century to the end of World War II, and ending with a

chapter on “Tasks for Peace in East Asia in the 21st Century”. Emphases in this book are not the usual ones that one finds in textbooks of the same period in Japanese – and American – schools. An indispensable companion for the individual who wants to understand the background of a region that is important today and is going to be increasingly important in the new century. 2007. 248p. 255x190. Paper. China. ISBN 978-7-119-04842-0.

HIS012

\$23.00

MAKAKO KAJ ANTONO. *Alfredo
GÓMEZ CERDÁ.* Trans. and color

illustrations by Pedro Ullate López. Children’s tale of two friends who work together in a freight train. Includes table of 271 interesting words found in the story. 2005. 64p. 190x130. Paper. Spain. ISBN 84-609-6107-9.

MAK001

\$18.20

MASTRO DE L’ RINGOJ, LA. J. R.

R. TOLKIEN. Trans. by William Auld. 2nd edition. The English fantasy trilogy that triggered the current global enthusiasm for fantasy. In three volumes (*La kunularo de l’ ringo*, *La du turegoj* and *La reveno de la reĝo*) the story recounts the adventure of two young hobbits setting out to destroy a ring of power which will, if allowed to fall into the wrong hands (and all hands are wrong hands, as the story shows), lead to the enslavement of Middle Earth. This new edition has been shorn of typos and some mistranslations have been corrected. 2007. 464+368+328p. 200x140. Paper. Russia.

MAS004

\$102.40

TIELAS VIVO. *Kore.* Eleven new songs and six older ones from this

European group. The disk also includes MP3s of the titles and a short MPEG videofilm of Kore in studio. There is a booklet containing the lyrics. Titles included are: Nova ŝanco (3:20); Karulino (2:57); Laŭ mi (3:15); Promeso via (4:00); La festo (2:31); Muzik’ (3:11); Pro mi (2:57); Stelo (3:27); Tielas vivo (3:22); Ni kuŝas ĉe ni (2:42); Mi brilu plu (Queen, with permission) (3:44); Bonan vojaĝon (4:01); Pro lucifer’ (4:39); Drag queen (4:43); Jen la provoso (4:09); Nova viv’ (4:20); Spegulo (3:32). 2007. CD: 57’06”. France.

TIE005

\$29.30

All books listed can be ordered: by mail from ELNA, PO Box 1129, El Cerrito CA 94530; by telephone at (510) 653-0998; by fax from (510) 653-1468; or through our website at <https://esperantousa.hypemart.net/butiko/butiko.cgi>. For phone, fax or website orders, be sure to include a credit-card number. For some titles with multiple stories or songs, more complete information about contents can be found at our website. If a title is out of stock at the time of ordering, you will be back-ordered and later charged at the time the title is shipped. Thanks largely to fluctuations in the value of the dollar versus other currencies, all prices are subject to change without notice.

“Tielas Vivo will have a wide appeal to many tastes”

Thomas Alexander

Jazz, pop, soft rock with a funky kick, catchy melodies, sweet harmonies, well arranged with fun rhythms. Music is, in the final analysis, a matter of personal taste which cannot be put into words. Nevertheless, I am confident in saying that Kore's new album, *Tielas Vivo*,



will have a wide appeal to many tastes. They even say so themselves in the impressive, trilingual, full color, 16 page liner notes booklet:

“Kore shines by a linguistic, musical, and vocal originality which is otherwise totally missing from the music scene today.”

Such apparently shameless self-flattery can be forgiven in the light of the first track “Nova Ŝanco” which tells of a passion for music, and the joy which can come from a successful collaboration – and the track moves, moves with a variety of organic sounds: acoustic-electric guitar, natural-sounding drums, fine singing with fine harmony. If you like simply to dance or swing to the music this track will move

you. Those with more sophisticated tastes will appreciate the way the musical backdrop changes through the song.

Without a doubt, this is one of *Kore's* greatest strengths, and they carry it through several of the tracks. At any

time, the band will drop out seamlessly and the listener is treated to any of a variety of sounds, often just the acoustic-electric guitar. I could listen to the two-guitar introduction of “Laŭ mi” all day long, but it's not even 10 seconds in when the drums jump on bringing in the rest of the band and we're ready to bop again. Oh, there's that acoustic guitar taking center stage, and the band jumps in one more time. Turn it up!

In addition to this funk-up soft rock, there are two ballads and a handful of harder numbers. My favorite of the ballads is “Promeso Via”, in which Kris Spitzer shows off his fine voice accompanied by piano. None of the harder numbers are among my

favorites, but I fully expect that some will disagree with me here, which, again, is why I think this music will have wide appeal.

The amount of “extras” on this disk is also impressive. First, there are 17 full-length tracks, most new but some are updated versions of earlier songs by *Kore*, roughly an hour of music, then there's the liner notes and CD ROM features including a few extra tracks, karaoke tracks for all the songs, and a five minute video recording.

The complete lyrics are available in the extensive liner notes. This is a great aid in picking out what is being said. (I found some tracks easier than others to follow lyrically.) The songs cover a variety of topics – music, love, life, *movado* – nothing you wouldn't want to sing out loud in front of your grandmother or grandchild. They go well with the music but would probably not stand on their own as poetry. There are too many *adasismoj*, identities, and other pseudo-rhymes, along with an occasional mis-accented word. (I wondered what “nebuloregaso” was, but the booklet indicated he was singing “nebuloregas” and not “nebuloregas”.) We should demand more from our poets, but this is not poetry, but music, and as such, it has a lot going for it. Definitely worth a listen.

Literatura Almanako

William R. Harmon

Ekde tre lastatempe haveblas nova eldonaĵo de Mondial, Novjorko, titolita *Beletra Almanako N-ro 1 (Septembro 2007)*. Ekde la unua vido mi ektaksis ĝin alte, pro tio ke ĝi estas bele kaj sekure bindita en plasta kovrilo, kun enhava kaj aŭtora informo – kaj bildo de saltpreta kato Dorian – sur la kovrilo. *Beletra Almanako N-ro 1* enhavas 176 paĝojn, en kiuj prezentas sin al la leganto vera aro da riĉaĵoj: prozo, poezio, eseoj, recenzoj kaj raporto pri beletraj konkursoj.

La aŭtoroj estas (por doni al vi guston): Jorge Camacho, Probal Daŝgupto, István Ertl, Tacuo Huĝimoto, Dimitrije Janičić, Edwin de Kock, Mao Zifu, Mauro Nervi, Ionel Oneç, Baldur Ragnarson, Humphrey Tonkin...

Mi hazarde malfermis la libron sur paĝo



53 kaj tie trovis prozaĵon de la fama islanda verkisto Haldór Laxness, tradukita de Baldur Ragnarsson: “Kiam Ferdinando estis pafita.” Ĝi estas ĉapitro el la granda romano de Laxness *Sendependaj homoj*. Kaj ĝi komenciĝas per alineo de nur unu frazo de 156 vortoj! Verŝajne tio estis tiel verkita por kapti la atenton de la komenco, ĉar tiom longaj frazoj ne aperas poste. La lingvaĵo de la prozaĵo estas

iom stranga, iom ekzotika, tamen en perfekta Esperanto kaj ege ĝuebla.

La enkonduka “Sinprezentado” de Jorge Camacho klarigas la kialon por la *Beletra Almanako*, kaj indas citi tie ĉi: “Fine de la pasinta jaro, la kultura panoramo de Esperantujo prezentis klarajn signojn de stagno. Pluraj personoj sentis kaj esprimis la bezonon je nova internacia literatura revuo, tamen neniu trovis la tempon aŭ la

kondiĉojn maturaj por lanĉo de kajero monata aŭ du-monata. Anstataŭe burĝonis la ideo publikigi libroforman Beletran Almanakon sen regula, deviga aperitrimo... BA komence aperos unu- aŭ du-foje jare. Ĝi enhavos diversajn rubrikojn: poezio, prozo fikcia aŭ nefikcia, eseoj, recenzoj, intervjuo, leteroj, debato ktp., originale kaj traduke; principe lige al beletro, sed eventuale ankaŭ al aliaj bel-arto kiel kino aŭ muziko, kaj foje eĉ pri t.n. movadaj temoj.”

Enestas tri eroj kiujn verkis usonaj esperantistoj: prozaĵo *Ruĝvela ŝipo* de Tim Westover kiu gajnis unuan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA en 2007, en la kadro de prozo; teatraĵo *Koroj en mallumo* – erotika melodramo de Brian E. Drake kiu gajnis la duan premion en la kadro teatraĵoj; originala prozo de Den Drown, *Florbrasikoj kaj aligatoroj*.

Beletra Almanako N-ro 1 estas aĉetebla de la libroservo de Esperanto-USA, ĉe www.esperanto-usa.org kontraŭ \$13.30, plus \$2.75 por sendokosto.

Noto: Alia, pli ampleksa recenzo troveblas ĉe <http://esperanto-usa.org/eo/node961>.

Esperantaj Vojaĝoj 2007-2008

Lusi Harmon

ELNA fariĝis Esperanto-USA dum nia kongreso en Tiĥuano, Meksiko 27-30-a de julio, 2007. Unu el la vidindaĵoj de la meksika flanko de la landlimo estas “la muro” kiu “protektas” nin de meksikaj enmigraĵoj.

La supra foto montras Arlyn Kerr kaj Amanda Higley Schmidt kun filino Aŭtuno rigardantaj la muron. Sube sur la trotuaro videblas Filipino Dorcas kaj lia fianĉino, Beth Magallon, promenante al la fino de la muro en la Pacifika Oceano. En la malsupra foto – trasidebla muro permesas al aliaj esperantistoj (Karen Klahr, Anna kaj Larry Bennet, Mar Cardenas, Robert Burgess kaj Allan Boschen) vidi kiel aspektas Usono de meksika vidpunkto. La suno brilas, la bela plaĝo invitas, sed la “border patrol” kun fortaj armiloj (AK-47’s) reprezentas la dividon inter niaj du landoj.

La 92-a Universala Kongreso okazis en Jokohamo, Japanio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto. Ĝi estis kompare malgranda sed bonege organizita, en belega urbo, kaj ne tro multekosta. El Usono aliĝis nur 12 partoprenantoj: George Baker, Joel Brozovsky, Marta Cardenas, Francisco Cruzley, Ron Glossop, Lusi kaj Bill Harmon, Frans kaj Dorothy Jahger, Lubov Kepuladze-Moreyno, kaj Humphrey Tonkin. Iom hontinde, malpli ol duono de la aliĝintoj venis de ekster Japanio. Tim Westover gajnis la unuan premion en la Belartaj Konkursoj por lia prozo, “Ruĝvela Ŝipo”.

La novelektita estraro de UEA estas in-

terese mult-talenta kaj multnacia: D-ro Probal Daŝgupta, Hinda Unio: Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado); S-ro Ranieri Clerici, Italio: Vicprezidanto (eksteraj rilatoj); S-ino Claude Nourmont, Luksemburgio: (kulturo,

S. BREWER (HTTP://FLICKR.COM/PHOTOS/LIMAKO)



S. BREWER (HTTP://FLICKR.COM/PHOTOS/LIMAKO)

La temo estas: Ekosistemoj, Lingvoj, Kulturoj. Diverseco por daŭripova evoluigo en la Amerikoj. Okazos serio de prelegoj kaj tri- aŭ kvartaga “praktikumo” por pli konkrete studi la problemaron kaj, interalie, ĝian signifon por esperantistoj. Ne mankos kulturaj kaj klerigaj programoj, ekskursoj ktp.

Tuj post la komuna Esperanto-USA-kongreso/TAKE, la 93-a Universala Kongreso okazos en Roterdamo la 19-26-an de julio. Eblas flugi al Montrealo kaj de tie flugi al Amsterdamo/Roterdamo kaj reflugi hejmen el Eŭropo sen reiri tra Montrealo. Pli da detaloj haveblos fine de la venonta monato, ĉar mi planas iri al Roterdamo en novembro.

Nepre nun kontrolu ke viaj pasportoj estos validaj por ambaŭ kongresoj. Aliĝiloj kaj helpoj por viaj planoj troviĝos ĉe:

Esperanto Vojaĝ-Servo

1824 Euclid Avenue

Berkeley CA 94709

510-531-8393 fax:510-531-0152

LusiHarmon@aol.com

Esperanto-USA
PO Box 1129
El Cerrito CA 94530

Non-Profit Org
US POSTAGE
PAID
Leesburg FL
Permit # 1040